

juna amiko

februaro 2020 • n-ro 1/2020 (162)



PROGRESIGA REVUO
POR LEGANTOJ
INTER 10- KAJ
100-JARAĜAJ

Evento: 7-a Esperanto- Semajno en Ĉinio.
Konversaciaj temoj: La sekretoj de la arbaro.
Internacia Tago de Virinoj: Olympe De Gouges.
Lude: Ju pli granda la deziro, des pli kara la akiro.
Interkultura Mondo: Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj.

Kolibrido



Semajnon poste.





Enhavo



Enkonduke: Karaj amikoj! (Stano Marček, SK); Karaj legantoj! (Mireille Grosjean, CH) 4



Konversaciaj temoj: La sekretoj de la arbaro (Judit Felszeghy, HU) 5



LUME: El mia kolora vivo (Pavel Rak, CZ) 10

Lingvaj problemoj: Itala vilaĝano pripensas lingvajn problemojn (Renato Corsetti, GB) 11



Fabelo: Homoj, kiuj serĉis matenon (Jozefo de Jesús Campos Pacheco, CU) 12



Kantu kun Juna Amiko:

Donu al mi ĉion (Małgosia Komarnicka, PL/José de J. Campos Pacheco, CU) 13

Internacia Tago

de Virinoj: Olympe De Gouges (Renée Triolle, FR) 15



LUDE, la unika dua etaĝo: Ju pli granda la deziro, des pli kara la akiro (Mónika Molnár, CH) 16

Evento: La 7-a Esperanto-Semajno en Ĉinio (Zhao Wengi, CN) 18



Fabelo: La kato kiu nomiĝis neĝopilko (Saliko, FI) 19

Amika rondo: 90-jara "Amika Rondo" (Ingrid Näsholm, SE) 21



Legu librojn – premioj – konkursoj: Klubo de bona

libro. Ekkonu mian landon pere de ĝia legendo. (Małgosia Komarnicka, PL) 22



Kiom stultan ideon mi havis... (Mireille Grosjean, CH) ...28

Recenzo: "Steĉjo-fabeloj" de Julia Sigmond (Luiza Carol, IL) 29

Poemo: Post reta diskuto eta (Blazio Vaha, HU) 30



Interkultura Mondo: Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj (Elena Nadikova, RU) 31

Fromaĝoj: Fortikaĝo kun fromaĝoj (Jacqueline Poux, FR) 34



LASTE, la tria etaĝo: Kongreso en Oceanio (Stefan MacGill, NL/HU) ...38

Eldonanto de *Juna amiko*: Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI). Jura sidejo: Centra Oficejo de UEA, Roterdamo, Nederlando. **Retejo**: sub rekonstruo ĉe ilei.mondo.info. Ĉefaj informoj pri *Juna Amiko*: <http://ilei.info/revuoj/?lingvo=eo>. Historio de la revuo: http://eo.wikipedia.org/wiki/Juna_Amiko. La numeroj de 0 ĝis 138 (1972 ĝis 2014) estas publike legeblaj ĉe: <http://www.eventoj.hu/juna-amiko/>. Vidu ankaŭ lernu.net kaj edukado.net. **Redaktoro**: Stano Marček (Zvolenská 15/21, SK 036 01 Martin, Slovakio), stano.marcek@gmail.com aŭ redakcio@gmail.com. **Lingvaj reviziantoj**: Karine Arakeljan (Armenio), Doi Ĉeko (Japanio) kaj Utho Maier (Germanio). **Rubrikestroj**: Judit Felszeghy, Stefan MacGill (ambaŭ el Hungario), Małgosia Komarnicka (Pollando), Mónika Molnár (Svislando), Elena Nadikova (Rusio), Luiza Carol (Israelo). **Kunlaboranto**: Raita Pyhälä (FI). Presita en Slovakio. **Administranto**: Sebastian Cyprych, ilei.officejo@gmail.com. **Landaj Perantoj** sur la p. 39. La sekva numero aperos en majo 2020. **Limdatoj por sendi kontribuojn**: ĝis la fino de januaro, aprilo, aŭgusto kaj oktobro. **Jarabono** € 18 en tiel nomataj A-landoj kaj € 13 en B-landoj, laŭ la kategorioj de UEA (€ 15 kaj € 12 por mendo de 3 aŭ pli da ekzempleroj al la sama adreso).

ISSN 0230 1318




Karaj amikoj!

Frontpaĝo de tiu ĉi numero de *Juna Amiko* montras ĉinajn lernantojn, kiuj preparas grandan afiŝon – slogan-rubandon, por la 7-a Esperanto-Semajno, kiu okazis decembre en la urbo Taiyuan, – por pli ol 1500 lernantoj!

Sur la sekva paĝo, kaj sur la dorso, vi povas denove ĝui du belajn komiksojn aŭ bildstriojn.

Pri sekretoj de arbaroj, pri sovaĝaj bestoj kaj ilia defendo kaj protekto vi povas legi en nia rubriko *Konversaciaj temoj*. Via mondo denove fariĝos pli kolora kaj pli riĉa danke al la rubrikoj *Lume* kaj *Lude*. En la numero vi ankaŭ ekscios pri lingvaj problemoj en italaj vilaĝoj – kaj kiel oni serĉis aŭ bonvenigis matenon en brazila vilaĝo, kun helpo de sakoj – aŭ kun kokerikanta virkoko.

Vi povas kun *Juna Amiko* denove kanti, ĉi-foje belan brazilan kanton, aŭ veni kanti



al Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj, kiu okazos ĉi-jare en majo, jam la 8-an fojon, en la pola urbo Vroclavo.

Kun *Juna Amiko* eblas ankaŭ soleni Internacian Tagon de Virinoj, honore al la estlara franca moderna virino, dum la franca revolucio, Olympe De Gouges, aŭ festi la 90-an datrevenon de “Amika Rondo” kun diverslandaj kursanoj en Svedio. Vi povas ankaŭ ekscii, kiel defendi birdojn kontraŭ katoj (kun blanka kato Neĝopilko) aŭ ekkoni Malsupran Silezion en Pollando. – Iam oni ricevas stultajn ideojn: ĉu la komponisto Schubert estis japano? :-) En la rubriko *Recenzo* vi konatiĝos kun la libro “Steĉjo-fabeloj” kaj post ĝi kun interesa poemo de hungara verkisto Blazio Vaha. – Cetere ĉu vi ŝatas fromaĝojn? La francaj, kiuj maturiĝas en “subtera katedralo”, certe bongustus al vi.


Agrablan jarkomencon kaj tre belan printempon deziras al vi

Via redaktoro **Stano Marček**

Karaj legantoj!

Belegan numeron vi faris, Stano, kune kun la skipo de *Juna Amiko*, la diversaj kontribuantoj, kiuj jaron post jaro tenas viva kaj interesa nian revuon. Mi elkore gratulas kaj dankas al vi ĉiuj.


Mi admiris la harplektaĵojn de polino Nela en paĝo 23. Mi devis pensi pri alia junulino, sveda, Greta Thunberg, kiu multe vojaĝas por klarigi la urĝecon de la modifoj en niaj farmanieroj influantaj la klimaton kaj la sanon de la planedo. Mi devis pensi pri la fama politikistino el Ukrainio Julia Timoŝenko, kiu same havas longajn blondajn harojn kaj foje plektas ilin belege.



Kiam mi estis infano (vidu la foton), mi same havis blondajn harojn kune plektitajn, sed ili ne estis longaj. Kaj mi estis scivolema... kaj estas, kiel Nela, kaj klopodas ne agresi la planedon, kiel Greta.

Per tiu numero de *Juna Amiko* vi povos progresi en la uzo de nia lingvo. Venante al nia Kongreso en Kebekurbon en julio same vi povos progresi. Se la salto trans la oceano estas tro longa vojaĝo por vi, bonvole pripensu veni al nia Kongreso en 2021, venu al Skotlando, al Edinburgo! Mi vizitos la urbon kaj konatiĝos kun Loka Kongresa Komitato en septembro 2020, mi povos iri el Svislando al Edinburgo trajne en unu tago, jen la influo de Greta! Mi deziras al vi agrablan legadon!

Mireille Grosjean



La sekretoj de la arbaro

Help-materialo por progresemluloj. Rubrikestro: Judit Felszeghy

I. En la lernejo

La instruistino (I) babilas kun siaj ok-jaraj gelernantoj Boriso (B), Dora (D), Eva (E), Filipino (F), Gaja (G), Johano (J), Karina (K) kaj Mario (M) en la lernejo.

B – Kie ni malkovros sekretojn?

F – Kiujn sekretojn ni malkovros?

E – Mi ŝategas malkovri sekretojn!

G – Kial ni malkovros sekretojn?

I – Atendu iomete, kaj mi klarigos ĉion al vi! En la sekva semajno, lundon, anstataŭ lerni en la lernejo, ni ekskursos al bela loko, proksime al la montoj. Tie komenciĝas Ronda Arbaro, kaj ni malkovros plantojn, kiujn vi eĉ ne konas. Vi ekvidos, kiom da sekretoj estas ĉirkaŭ ni! Se ni havos bonaŝancon, ni povos kaŝrigardi ankaŭ sovaĝajn bestojn! Do, tiu, kiu povas, kunportu fotilon!

K – Ho, mirinde! Mi foje jam estis tie!

I – Ni promenos tie nur 3 aŭ 4 horojn, poste ni kune revenos al la lernejo, kaj vi iros hejmen en la kutima tempo. Sed nun vi ĉiuj enskribu en vian mesaĝkajereton la sekvon:
„La 12-an de aprilo, lundon, nia klaso ekskursos al Ronda Arbaro; ni revenos je la 1-a posttagmeze.”

(Post tri tagoj, dum la ekskurso)

I – Kiu konas tiun belan floreton?

D – Ĝi estas violo, ĉu?

I – Kaj tiun ĉi verdan planton? Atentu, ne tuŝu ĝin, ĉar poste brulos via haŭto!

E – Do, ĝi estas artikolo! Mi konas ĝin; en ĝi estas ankaŭ multaj vitaminoj kaj mineraloj!

I – Bonege, Eva, vi pravas! Ŝŝŝ! Mi menciis sekretojn! Jen, rigardu la vulpidojn!

Geknaboj: – Kie? Mi ne vidas ilin! Kien ni rigardu? Kio estas tie?

I – Ŝŝŝ! Tie, iom fore, apud tiu dika arbo! Ili estas tri. Jam ankaŭ la vulpopatrino ĉeestas. Ni pluiru silente! Ni eniru en la arbaron.

K – Kiel belaj kaj altaj arboj! Ili ĉiuj rigardas nun nin!

M – Vi diras stultaĵojn, Karina! Kiel ili povu ion ajn rigardi!

I – En la naturo estas multaj sekretoj, kaj ni ankoraŭ ne ĉiujn konas! Sed ĉu vi konas tiujn arbojn?

E – Mi jes, estas pinuoj kaj fagoj!

J – Krome kerkoj!

I – Ne „kerkoj”, sed kverkoj! Vi bone konas la arbojn!

B. – Kio estas tiu bruo? Ĉu motorcikloj?

I – Ne, sed tio estas maŝinoj!

G – Oni forhakas la arbojn en la arbaro!

K – Ho, povraj! arboj, ili ja ploras!

B kaj M – Oni ne rajtas tion fari! Kiuj ili estas?

J – Ni voku la policon!

I – Geknaboj, haltu! Ne pluiru; estas danĝere iri tien; dehakita arbo povas fali sur vin! Restu ĉi tie, kaj mi demandos, kial la arboj estas eligitaj!

...

I – La arbohakistoj diris, ke ili laboras laŭ la ordono de la urba estraro. Unu el ili eĉ montris al mi iun paperon... – Kion fari?

La geknaboj duonvoĉe: – Kiel stulta ordono!... Kial dehaki tiel belajn arbojn!... Ĉu la tuta arbaro estos forhakita?...



Konversaciaj temoj

- K – Sinjorino instruistino, ĉu ni povas fari nenion kontraŭ tio?
- I – Mi timas, ke ne. Kien vi kuras, Karina? Ni jam devas reveturi al la lernejo! Revenu!
- K – (Alkurinte al iu granda arbo, flustre):
– Ne ploru! Ne timu! Mi ne lasos mortigi vin! Mi promesas tion al vi!

II. Post la ekskurso

Hejmenirante Karina (K) babilas kun sia patrino (P).

- P – Kiel sukcesis la ekskurso, filineto?
- K – Ĝi estis tre interesa, Panjo! Ni vidis vere multajn sekretojn!
- P – Ho, ĉu? Kiujn?
- K – Tie estis vulpidoj; ili estis tre ĉarmaj! Ili ludis tie, poste venis ilia patrino kaj ili tiam foriris! Mi volonte karesus ilin! Krome estis sciuroj; ni vidis ilin inter la arboj, kiel ili saltadis de unu branĉo al la alia. Ankaŭ multaj birdoj estis, sed plej ofte ni nur aŭdis kaj ne vidis ilin. Ni lernis ankaŭ pri multaj arboj kaj plantoj!
- P – Ĉu vi eble eĉ rememoras pri ili?
- K – Jes, kverko, pino, fago kaj... mi devas pensi... Kaj estis aliaj plantoj. Urtiko, ekzemple. Panjo, ĉu vi sciis, ke se vi tuŝas ĝin, poste doloras via haŭto? Sed tamen ĝi estas tre valora planto! Ankaŭ aliajn kuracherbojn ni vidis tie, kaj tre belajn floretojn. Nun mi ne rememoras pri la nomo de ĉiuj. Tiu ĉi arbaro estas mirinda!
- P – Mi ĝojas filineto, ke vi havis tiel belan ekskurson!
- K – Panjo, estas granda malbono!
- P – Kiu malbono?
- K – Oni tie forhakas la arbojn! En Ronda Arbaro! Kie loĝas vulpoj kaj sciuroj kaj multaj birdoj! Kie nun ili loĝos? Tie estas ilia hejmo! (Karina ploras.)



- P – Ne ploru, Karinjo mia! Kiujn arbojn oni forhakas? Kaj kio estas tiu „oni“?
- K – Tie, preskaŭ meze de la arbaro! Jam multaj arboj estas forhakitaj, kaj tie restas nenio, nur la kota tero! Tie estas arbohakistoj kaj maŝinoj, kiuj forigas la radikojn de la forhakitaj arboj! Krome ŝarĝaŭtoj, kiuj forportas la povrajn arbojn! Panjo, tio aspektas terure!

En la sekva tago, post la leciono, la gelernantoj Boriso (B), Dora (D), Eva (E), Filipino (F), Gaja (G), Johano (J), Karina (K) kaj Mario (M) en la lernejo, inter si, poste kun la direktoro (Dir):

- D – Ni faru ion, por ke oni ne forhaku la tutan arbaron!
- J – La tuta arbaro ne estos forhakita, laŭ mi!
- E – Eĉ dek forigitaj arboj estas multaj! Kiel malbele nun aspektas tiu tereno!
- M – Ni protestu! Ni iru kune tien, kaj malhelpu la forhakadon de la arboj!
- B – Ni ne povos malhelpi tion! Mia patro diris, ke iu volas tie konstrui grandan hotelon kaj naĝejon.



F – Kial naĝejon? En la urbocentro estas granda bela naĝejo!

J – Hotelon en la arbaro! Por riĉuloj, por ke ili sen paŝado atingu la arbojn!

B – Se ankoraŭ restas arboj!

K – Ni ne lasu, ke la arboj kaj la bestoj malaperu el Ronda Arbaro!

Dir. – Geknaboj, saluton, ĉu vi atendas iun? Ĉu iu problemo?

K – Saluton sinjoro direktoro! Ni nun diskutas kion eblas fari, por ke la arboj de Ronda Arbaro ne estu forhakitaj!

Dir – Ĉu vere el Ronda Arbaro la arboj estos forhakitaj? Ĉu vi ne eraras?

Geknaboj: – Ni estis tie! Ni vidis tion!
Jam multegaj arboj estas faligitaj.
La tereno, kvinoble pli granda ol nia lernejo, jam estas sen arboj!

K – La vulpoj kaj sciuroj ne havos hejmon!

E – La birdoj malaperos!

M – Kien ni iros promeni kaj fari ekskurson?

Dir – Do, venu al mia kabineto²; ni parolos pri la afero!

La sekvan tagon, hejmenirante el la lernejo, Karina (K) babilas kun sia patrino (P):

K – Saluton Panjo!

P – Saluton Karina! Kio pri vi? Mi jam delonge vin atendis ĉi tie, antaŭ la lernejo; viaj lernohoroj jam devis finiĝi, aŭ ĉu mi eraras?

K – Ne, Panjo, sed okazis tute alia afero! Mi estis ĉe la urbestro!

P – Kio??? Kie vi estis? Vi nenion diris pri tio al mi! Kial vi estis ĉe la urbestro?

K – Mi ne diris tion al vi antaŭe, ĉar eble vi ne permesus tion. Kaj tio estis ege grava afero.

P – Nun tamen mi eble rajtas scii pri tio, ĉu?

K – Jes, mi rakontos. En la lernejo ni babilis pri Ronda Arbaro, ke oni volas forhaki tie la arbojn. La direktoro alvenis, ni rakontis al li ĉion, kaj li proponis, ke ni parolu kun la urbestro. Li diris, ke la urbestro estas bona kaj komprenema homo, kaj se ni rakontos al li, kial ni ne volas la arbohakadon, li certe helpos nin. Kaj hodiaŭ ni ĉiuj iris tien, ne nur el nia klaso, sed ankaŭ el la aliaj klasoj, ni estis tie tre multaj.

P – Do, parolu iom pli klare, filineto! Ĉu vi ĉiuj estis en la urbestra oficejo? Kiel?

K – Ne, nur mi! La aliaj staris sube, tuj antaŭ la fenestro de la oficejo! Eĉ la trafiko haltis, ĉar ni estis tiom multaj! La direktoro diris, ke ni estu kiel eble plej multaj! Tial ni invitis ankaŭ aliajn infanojn de la lernejo.

P – Nekredeble! Kiel vi povis eniri la urbestran oficejon?

K – Tio estis simpla afero! Mi rigardis, kie troviĝas la urbestra oficejo, kaj poste mi iris al la unua etaĝo, ĉar ĝi estis tie. Kiam la sekretariino demandis, kiun ni serĉas, mi diris, ke mi atendas mian paĉjon.

P – Karina, Paĉjo ne tie laboras!

K – Tion ja mi scias! Sed mi ne volis diri, ke mi kun la urbestro volas paroli! Kiam la sekretariino iris for por momento, mi eniris en la kontoron¹.

P – Kaj kion diris la urbestro? Ĉu li ne estis kolera?

K – Ne, li nur miris. Kaj kiam mi diris, ke mi volas diri ion tre gravan, nome de multaj infanoj, kaj ke temas pri nia estonto, li diris, ke mi sidiĝu, kaj li aŭskultis min. Mi montris al li, tra la fenestro, la infanojn starantajn tie. Mi rakontis, kion ni vidis dum la ekskurso. Mi rakontis, ke Ronda Arbaro estas tre grava por ni. Mi rakontis, ke arboj pli multe gravas por ni ol hotelo tie. Mi rakontis, ke

1) Kontoro: oficejo.

2) Kabineto: speciala ĉambro (de direktoro, instruisto...





sen bestoj en la proksimeco la vivo estus seninteresa kaj trista. Li ne estis kolera, ĉar mi ŝtele eniris al li, sed lia vizaĝo estis serioza. Li diris, ke li komprenas min, kaj li faros ĉion, por ke nia vivo ne estu trista.

P – Vi estas kuraĝa, filineto mia; mi estas fiera pri vi!

III. Post du tagoj, matene, en la arbaro.

Ĉirkaŭ 50 gelernantoj, inter aliaj **Boriso (B), Dora (D), Eva (E), Filipo (F), Gaja (G), Johano (J), Karina (K)** kaj **Mario (M)**, kaj la instruistino **(I)** **babilas kun la laboristoj (L1, L2, L3):**

L1 – (Tre kolere:) Ĉu vi denove estas ĉi tie? Vi devas esti nuntempe en la lernejo! Tuj foriru de ĉi tie, ĉar la maŝinoj ne povas labori!

L2 – Ĉu vi ne aŭdis? For-ir-uuu!

L1 – Mi jam vere perdas mian paciencon! Jam de semajno ni povas fari nenion! Venu, Luĉjo, ni fortiru la infanojn de ĉi tie!

I – Ne provu tuŝi ilin! Ili estas infanoj; ili faras neniun damaĝon, nur sidas! Vi ne rajtas tuŝi ilin!

L2 – Aha! Do vi estas ja la instruistino! Anstataŭ instrui ilin pri utilaj aferoj, vi helpas kaŭzi damaĝon al la homoj!

B – Ĝuste vi faras damaĝojn!

L1 – Do, jam vere sufiĉas! Tuj foriru de la arboj!

M – Ni restos ĉi tie, por defendi la arbojn!

L3 – Mi telefonvokos tuj la posedanton kaj la policon! Kaj vi vidos, infanaĉoj, kio sekvos!

K (Mallaŭte, nur al la proksimaj infanoj) – Ni devas ankoraŭ iom elteni! La urbestro promesis al mi, ke plej malfrue li venos hodiaŭ kun bona solvo!

L3 – Jam longe vi ĝenas nin ĉi tie! La posedanto diris, ke li venos baldaŭ, kaj li informis ankaŭ la policon pri la afero!

E kaj D – Ni tute ne timas la posedanton! Tiuj arboj estas niaj, kaj ni ne permesos ilin forhaki!

L2 – Aĉaj infanoj! Do, tion vi lernas en la lernejo, ĉar vi havas tian instruistinon!

K – Ho! Geknaboj! Rigardu! Jen alvenas la urbestro!

En la sama tago, post kelkaj horoj, hejmen-irante el Ronda Arbaro, Karina (K) kaj la instruistino (I) babilas kun la patrino de Karina (P).

K – Kiel bone estis panjo, ke vi alvenis ĝusta-tempe! Mi jam laciĝis pro daŭra starado kaj sidado apud la arbo, jam la trian tagon! Sed mi ankoraŭ alkuros al ĝi; mi tuj revenos!





Vi kaj la aliaj ne estos forhakitaj!
Mi promesis tion al vi!

TASKOJ

I.

- Legu la unuopajn dialogojn, kaj klopodu kompreni la tekston!
- Rakontu (laŭte), en via gepatra lingvo, pri kio temas en la dialogo!
- Kiuj arboj, plantoj kaj bestoj aperas en la dialogo?



II.

- Rakontu esperantlingve, kiuj arboj, plantoj kaj bestoj troviĝas en arbaroj aŭ sur kampoj en via regiono!
- Rakontu esperantlingve, laŭte, pri kio temas en la unuopaj dialogoj, sed dume ne rigardu la tekston!
- Rakontu kion vi vidas sur la bildo!

III.


a) verku dialogojn:

- inter la direktoro kaj la gelnantoj,
- inter la arbohakistoj kaj la instruistino,
- inter la urbestro kaj Karina,
- inter la urbestro kaj la tereno-posedanto!



b) verku leteron, kiu:

- rakontu pri via (imagita) ekskurso en arbaro,
- rakontu kion vi faras, aŭ povus fari por savi arbojn,
- rakontu, kiel zorgas via komunumo, aŭ via loĝurbo pri la naturo,
- rakontu, kion via urbo aŭ lando povus fari por defendi la naturon,
- rakontu, kial gravas laŭ vi la ĉeesto de arboj kaj arbaroj!



P – Bone, filineto, ni atendos vin!

I – Mi jam estis zorgema, dum ni sidis apud la arboj, kaj la arbohakistoj kverelis kun ni. Karina diris, ke la urbestro promesis al ŝi, ke li solvos la aferon de Ronda Arbaro. Kaj fakte, la arbaro ne estas privata posedaĵo, sed nur malgranda parto ekster ĝi. Nun la arbohakado ĉesis, kaj la tuta teritorio fariĝis protektata. Tio estis la merito de Karina!

P – Bonŝance Karina rakontis ĉion hejme! Ŝi eĉ ne scias, sed mi jam ekde mateno staradis rande de la arbaro, kaj atendis, kio okazos. Mi rigardis la vojon, kiam alvenos la aŭtomobilo de la urbestro. La defendo de Ronda Arbaro estas la merito de la infanoj. Karina fariĝis preskaŭ plenkreska dum tiu tempo. Rigardu, ŝi staras nun apud ŝia preferata arbo!

K (Iom fore, mallaŭte al iu granda arbo):
– Vidu, vi jam ne plu devos timi!




El mia kolora vivo

Verkinto kaj desegninto: Pavel Rak



Kolorigu la suban bildon laŭ la supra! Nomu la objektojn, fruktojn kaj homojn! Kie ili estas? Kie ili estas? Kion ili faras? Kiujn vestojn portas la homoj? Kiujn kolorojn havas la objektoj, fruktoj kaj vestoj? Kio okazas sur la bildo?



Kolorigu! Trovu la diferencojn!



Renato Corsetti

Itala vilaĝano pripensas lingvajn problemojn



Kiel ne ĉiuj scias, italaj dialektoj estas ankoraŭ vivantaj kaj viglaj kaj uzataj, kaj poemoj en dialektoj abundas.

Cetere la plej popol-amataj italaj kantoj estas en dialektoj. Ekzemple la konata itala kanto “O sole mio / Ho mia suno”, kiu estas konsiderata tipe itala, en la realo estas kanto en la dialekto de Napolo. En ĉi tiu situacio mi volas prezenti al vi hodiaŭ la poeton Modesto Dalla Porta [1885-1938], kies poemoj estas en la dialekto de lia naskiĝvilaĝo, Guardiagrele [güardjagrele], vilaĝego aŭ urbeto (preskaŭ 9 000 loĝantoj en la landoparto Abruzzo [abruco]. Li estis tajloro kaj verkis multajn poemojn aperintajn en libroj kaj konatajn en Centra Italujo. Ni okupiĝas nun pri lia poemo pri la lingvaj problemoj, spertataj de la vilaĝanoj: la kuracisto skribas per tiel nekomprenbla skribo, kiun nur la apotekisto komprenas, kaj la pastro, kiu dum la religiaj ceremonioj parolas latine [la itala estis enkondukita en la di-servojn nur komence de la jaroj 1960-aj]. Ne necesas pliaj klarigoj por ĝui ĝin. Rimarku la nomojn, kiuj estas esperantigo de dialektaj nomoj: Ndonjo/Antonio en la norma itala, Kajtano/Gaetano, Dunato/Donato.



FAKO-SEKRETO (Lu secrete di professione)

*Mia amiko Ndonjo certe pravas:
“kaj kuracist’ kaj pastro estre rolas
ĉar unu tre misteran skribon havas
kaj fremdan lingvon la dua parolas”.*

*Iome vin palpumas kuracisto
kaj tuj recepton skribas kvazaŭ greke,
poste vi pagos al apotekisto
pro la traduko, dialektobleke.*

*Ja ĉiam samas kuracilefiko,
ja samas gust’, ŝanĝiĝas nur koloro.
Se lertus ni pri greka gramatiko,
ni povus zorgi meme pri preskribo
por peti tiujn kaĉojn ĉe doktoro,
kaj ĉesus la teroro de ĉi-skribo.*

*Kiam di-servas pastro tre solene
aŭ litanias per kanto senfina,
postzumas ni en lingvo fuŝlatina,
parkere, vortomaĉe, nekomprenne.*

*Tamen se kiel tuta la popolo
parolus malbenita ĉi-fripono,
alia estus tiam la kanzono,
finiĝus tiam lia monopolo.*

*Iĝus Kajtano nia preĝkantisto,
baptus Dunato bebojn sen tarifo;
kaj nur pripensu Ndonjon la miopan,
jardekojn estis li
preĝeservisto,
se por li estus klara la
signifo, li rangon havus
nun jam episkopan.*



Modesto Della Porta,
trad. Renato Corsetti





Brazila fabelo:

Homoj, kiuj serĉis matenon

Promenanto atingis nokte foran domon. Ĉar estis tre malfrue, la domanoj proponis al li manĝaĵon kaj dormejon.

La homo jam enlitiĝis, kiam li vidis, ke ĉiuj familianoj eliris el la domo kun malplenaj sakoj.

„Kien vi iras?” – demandis la homo.
„Ni serĉos la matenon”, – respondis la familianoj. Scivoleme, la homo atendis, ĝis kiam ĉiuj estis eliritaj, kaj sekrete sekvis ilin. Kiam komenciĝis la matena krepusko, li vidis, ke la familianoj fermis la sakojn per ŝnuroj, revenis kun la sakoj surdorse al sia domo kaj tie, en la korto, elŝutis ilin. La homo ne povis reteni sian scivolemon kaj demandis: „Kial vi faras tion?” – „Ni alportis la matenon. Rigardu, kiel nun komencas heliĝi!”



La vizitanto, sen kompreni tion, adiaŭis kaj dankis siajn gastigintojn. Li devis nun daŭrigi sian vojon.

Unu tagon poste li revenis kun donaco, kaj, post saluto al siaj gastigintoj, la homo diris: „Mi alportis tiun ĉi birdon al vi. Ĝi estas virkoko. Kun tiu virkoko ĉe vi, vi ne bezonas iri, por serĉi la matenon. Do, ĝi avertos vin pri alveno de la mateno. La unuan fojon, kiam vi aŭdos ĝian kantadon, ĝi avertos vin, ke la mateno estas ankoraŭ malproksima, la duan fojon, ke la mateno proksimiĝas, kaj la trian fojon, ke la mateno estas jam ĉi tie.” Kaj, sen diri vorton plu, li foriris.

La homo ne estis malproksima, kiam la dommastrino ekkriis: „Ni ne scias, kion manĝas tiu besto. Kuru kaj atingu tiun homon kaj demandu, kion ĝi manĝas.”

Tre proksime de la homo, kaj preskaŭ senspira, la dommastro demandis: „He, he, amiko! Diru al mi, kion manĝas tiu birdo?!” – „Ĉion”, la homo respondis, kaj daŭrigis sian vojon.

La dommastro revenis al la domo kun granda timo, kaj kiam li vidis sian edzinon, li bedaŭris: „Kia malĝojo, edzino mia! Tiu birdo manĝas ĉion. Kaj mi certas, ke ĝi manĝos nin. Kion ni faru?” – „Do, ni mortigu ĝin antaŭ ol ĝi voros nin ...” – ordonis la virino, kaj ĉiuj jetis sin sur la beston...

Kaj oni diras, ke la familianoj ree iradis ĉiun nokton por serĉi la matenon. Kaj kion pri la koko? La koko, vidante siajn

agresantojn, saltis en la aeron kaj flugis tiel rapide, ke ĝi atingis vilaĝeton, kaj el tiu vilaĝeto, per sia gaja kokerikado, nun anoncadas la alveno de la mateno.

Elhispanigis
Jozefo de Jesuŝ
Campos Pacheco



La sorĉa kanto-mondo

La rubrikon preparas Małgosia Komarnicka,

ul. Kilińskiego 14/3, PL-59-300 Lubin, malgosia.junaamiko@gmail.com



Kanto akompanas nin ĉie... Ni volonte aŭskultas ĝin, ĉar ĝi helpas vidi kaj krei alimaniere la mondon, ebligas revii, aŭ transdoni niajn sentojn.

Ĝi ankaŭ helpas akiri pli bonajn rezultojn dum lernado, ĉar lernantoj, kantante, samtempe lernas, kreskigas sian emocian engaĝiĝon en la lerno-procezo. Sufiĉas nur ekkanti, kaj ili tuj memoras la kanto-vortojn. Tiamaniere la lernantoj plej bone kaj sugestie alproprigas al si la materialon de la leciono, ofte ne konsciante, ke ili ekzercas sin en fremda lingvo.

La laboro kun kanto havigas ĝojon kaj kontenton al la lernantoj, kaj do ni ne malhelpu ĉi tiun agrablecon de kantado dum la Esperanto-lecionoj.


La kanton *Donu al mi ĉion* rekomendas José de J. Campos Pacheco, brazila esperantisto kaj longdaŭra kunlaboranto de nia revuo. Charlotte Kohrs estas verkistino de la kanto. Ŝi komponis 12 konversaciajn kantojn por lernantoj por faciligi lernadon



Kantu Esperante
kun Janico kaj Johano

12 Konversaciaj Kantoj por Komencantoj

TUTESPERANTA LERNOLIBRETO



Desegno de Felicia Wolfe, aĝo 9.

Verkisto: Charlotte Kohrs

Kantistoj: Janice kaj John Atkinson

© 1988, 1989, 1991 *Infanaĵ Ĉirkaŭ La Mondo*
8894 Berkay Avenue, Jennings MO 63136, USA
per helpo de Eduka Fondajo Carson, Kanado

II. DONU AL MI ĈION

DO - MI AL KE - TA AĜ - KON - DO - MI AL KE - LA NAN - Ĉ - SON -

g g d7 EmA Bm

DO - MI AL KE ĈI - ON - DON - KON - NE POR - GE - SU I - ON -

C C g d7 AmA d7 g

ME PE - TAS, POR - GE - SU NE - NE - ON - DON - VO - LU KE - MO - RE ĈI - ON -

d7 EmA d7 C g

DAN - KON -

d7 g

Donu al mi ĉion!

Rekantajo
Ne forgesu ion.
Mi petas, forgesu nenion.
Bonvolu memori ĉion. Dankon.

II
Montru al li la libron.
Montru al li la leteron.
Montru al li ĉion. Dankon.

III
Diru al ni la rakonton.
Diru al ni la novaĵon.
Diru al ni ĉion. Dankon.

IV
Sendu al ŝi la florojn.
Sendu al ŝi la donacojn.
Sendu al ŝi ĉion. Dankon.

Desegno de Deanna Esprituro, aĝo 12





de Esperanto. Tiuj kantoj estis eldonitaj en la libreto “Kantu Esperante” kaj ankaŭ en formo de son-kasedo *Kantu Esperante kun Janico kaj Johano*. La libreto estis eldonita de “Infanoj Ĉirkaŭ la Mondo” en 1988, kun helpo de Eduka Fondaĵo “Carson”, Kanado. Kantante tiun kanton ni lernas finaĵon “u”.

Charlotte Kohrs estas fondintino de “Infanoj Ĉirkaŭ la Mondo” kaj ĝia multjara direktorino (ĝis sia morto en 2002). Ŝi tre interesiĝis pri instruado de Esperanto al infanoj. Ŝi ne nur verkis, komponis, sed ankaŭ eldonis kaj distribuis tra la mondo informojn pri sia institucio. Pro sia granda laboro por Esperanto, en 1999 ŝi estis nomita “Honora Membro” de Esperanto-Ligo de Nord-Ameriko. Charlotte Kohrs estis tre optimisma persono, kiu opiniis, ke eĉ unu persono povas plibonigi la mondon.

Donu al mi ĉion

1.
Donu al mi la akvon.
Donu al mi la manĝaĵon.
Donu al mi ĉion. Dankon.

Rekantajo:
Ne forgesu ion.
Mi petas, forgesu nenion.
Bonvolu memori ĉion. Dankon.

2.
Montru al li la libron.
Montru al li la leteron.
Montru al li ĉion. Dankon.

3.
Diru al ni la rakonton.
Diru al ni la novaĵon.
Diru al ni ĉion. Dankon.

4.
Sendu al ŝi la florojn.
Sendu al ŝi la donacojn.
Sendu al ŝi ĉion. Dankon.

La kanton vi povas aŭdi ĉe:

<https://icxlm.org/kantu/donu05.mp3>

kaj: <https://icxlm.org/kantu>

Bonvolu respondi:


1. Kiu skribis la tekston de la kanto?
2. Kiu komponis la muzikon al la teksto?
3. Kiu rekomendas la kanton, kaj kie li loĝas?
4. Detaligu kion mi donu kaj montru?
5. Detaligu kion mi diru kaj sendu?
6. Priskribu desegne la tekston de la kanto laŭ via imagpovo.

Viajn respondojn bonvolu sendi ĝis la 30-a de marto 2020 interrete al *małgosia.junaamiko@gmail.com* kaj la desegnaĵojn al la adreso:

Europejskie Centrum Edukacji
Międzykulturowej, ul. Kołłątaja 26A,
PL-50-007 Wrocław, Polska.

Valorajn premiojn fondis pola organizaĵo
Eŭropa Centro de Interkultura Edukado:
www.ecem.com.pl

Bonvolu sendi al *małgosia.junaamiko@gmail.com* proponojn de viaj naciaj kantoj, por ke la legantoj de *Juna Amiko* havu la eblecon ekkoni belajn kantojn el la tuta mondo.





Renée Triolle

Olympe De Gouges (1748-1793) – moderna virino dum la franca revolucio

Verŝajne neniu ekster Francio konas tiun virinon, Olympe de Gouges (*Olemp' de Guŝ*), kaj eble neniu en Francio legis ion el ŝia literatura verkaro.

Tamen Unesko listigis ŝin inter la famuloj, kiujn oni festos dum la periodo 2020-2021, okaze de la 250-a datreveno de ŝia ekverkado (1771). Interese estas, ke ŝi estis komplete forgesita ĝis la jubileo de la franca revolucio en 1989, kiam historiistoj konstatis, ke ŝi estas defendanto de la virinaj rajtoj, ĉar apud la oficiala “Deklaracio de la rajtoj de la homo kaj civitano”, ŝi verkis en 1791 “Deklaracion de la rajtoj de virino kaj civitanino”. De tiam ŝi iĝis nemalhavebla figuro de la virinaj rajtoj; ŝia nomo estis donita al lernejoj, stratoj, placoj aŭ teatroj.

Iom pri ŝia vivo

Ĉu ŝi naskiĝis en 1748 aŭ 1755, neniu vere scias, sed ŝi naskiĝis en suda franca urbeto Montaŭban (*montoban'*) en familio de buĉisto, kvankam ŝia biologia patro estis supozeble etnobelulo, Markizo Jean-Jacques Lefranc de Pompiignan, teatraĵisto. Ŝia vera nomo estis Marie Gouze (*Maria Guz'*). Laŭ la tiamaj kutimoj, gepatroj edzinigis ŝin al viro, 30 jarojn pli aĝa ol ŝi. Ŝi naskis filon. Kiam la edzo mortis en 1766, ŝi ne plu edziniĝis, ĉar la leĝo malpermesis al edzino eldoni verkon sen la konsento de

la edzo, kaj ŝi deziris verki kaj eldoni siajn verkojn. En 1770 ŝi transloĝiĝis al Parizo kun la filo, al kiu ŝi havigis altrangan edukadon. Ŝi vivis el financa subteno de diversaj amantoj, renkontiĝis en salonoj kun diversaj beletristoj, pensuloj, kaj komencis verki engaĝitajn teatraĵojn (ŝi verkis pli ol dudekon).

Ŝiaj bataloj

Eĉ se la registaro kontrolis kaj cenzuris teatraĵojn, ŝi skribis kontraŭ sklaveco: en 1792 estis ludita en la fama teatro “Franca Komedio” (*Comédie Française*) “Zamore kaj Mirza aŭ bonŝanca ŝippereo” (la originala titolo estis “Sklaveco de nigruloj, aŭ bonŝanca ŝippereo”, tre aŭdaca temo, kiam la “Nigra kodo”, verkita sub la regno de Ludoviko la XIV-a, kiu reguligis la sklavigon kaj riĉigis la sklavigistojn, kiuj laboris laŭ la fama triangulo: kupto de nigruloj en Afriko (kun helpo de lokaj afrikaj vilaĝestroj); ilia transporto en tre aĉaj kondiĉoj al Ameriko, ĉefe Usono kaj Brazilo, kie nigruloj estis venditaj; kaj transporto de varoj al Eŭropo.


Olympe de Gouges skribis ankaŭ eseojn pri koloniigo kaj la rajtoj de “rasmiksitaj” infanoj, gefiloj de blanka estro kaj nigra servistino.

Apud ŝiaj bataloj por liberigo de sklavo kaj egaleco ŝi ankaŭ pledis por kontrakto inter viro kaj virino, okaze de la geedziĝo.

Ŝi ankaŭ eldonis en 1788 programon de sociaj reformoj.



Ju pli granda la deziro, des pli kara la akiro



La rubrikon prizorgas **Mónika Molnár**




Ulideto kaj la nova knabo pasigis pli kaj pli da tempo kune en la lernejo. Ili malkovris multajn komunajn ŝatokupojn kaj ĉiufoje ili ĝoje kriis: „Ĉu ankaŭ vi?”

La vivo de Ulideto pleniĝis je ĝojo kaj entuziasmo. La vesperoj ŝajnis esti ĉiam tro mallongaj por povi rakonti ĉiujn aventurojn de la du knaboj. Ili fariĝis bonegaj amikoj. La familio estis kontenta kaj Ulideto estis pli ol kontenta. Tamen, iun tagon, kiam Ulideto revenis el la lernejo... Ho, li havis denove tiun tristan kapon, kiu ĉiam klare anoncas al la gepatroj, ke okazis io, kio tristigis la etulon. Ili sciis ankaŭ tion, ke malutilas



tro demandi lin pri la kaŭzo, ĉar unue li ĉiuokaze diros nenion, nur levos la ŝultron dirante: „Nenio.” Ho, kiom da infanoj, tiom da karakteroj. Tiu de Ulideto estis samtempe facila kaj malfacila karaktero. Facila, ĉar sufiĉis etaj aferoj por ĝojigi, entuziasmigi lin; kaj malfacila, ĉar kiam io ne iris glate, li enfermiĝis kiel timema erinaco kaj tiam ne estis simpla afero ekparoligi lin. Tamen... Iom post iom oni ĉiam sukcesis ekscii la ĉagrenon de tiu erinaceto. Ankaŭ ĉi-foje okazis tiel. Post iom da klopodoj la familio rajtis ekscii, ke la proksimiĝantaj vintraj ferioj kaŭzas la tristecon de la etulo, ĉar por li tiuj ferioj signifas unu tutan semajnon sen la amiko. Avinjo tuj sciis kiel reagi al tio. Ŝi rapide serĉis belan rakonton de Maïwenn Grandjean [‘majven granĵan] kaj donis ĝin al Ulideto.


		
<p>Maïwenn Grandjean: La du fratinoj en la montaro</p>	<p>Estis foje du fratinoj, kiuj havis la saman revon: iri kune sur belajn montojn.</p>	<p>Sed ili sciis, ke tio kostas multe, do ili nur revis pri ĝi. – Estas vespero, infanoj, iru en la liton! – diris la gepatroj.</p>



-Jes, jes! – diris obeeme la fratinoj. – Bonan nokton Panjo kaj Paĉjo!
– Dankon! Bonan nokton ankaŭ al vi! – diris la gepatroj.

Kaj matene... – Saluton infanoj, ni havas surprizon por vi.
– Kiun surprizon? – Hodiaŭ ni iros sur la montojn! Ĉu bone? – Ho, jes! Jes, jes, jes!

La infanoj estis tre ĝojaj kaj ekscititaj dum la tuta vojaĝo, ĝis kiam ilia aŭto atingis la belan hotelon „Hotelo de floro”, ie sur la montoj.



– Saluton, ni rezervis ĉambron en via hotelo. Ĉu estas en ordo? – Jes. Unu ĉambro por du plenkreskuloj kaj du infanoj. Estas la ĉambro 33. – Koran dankon! – Nedankinde!

La sekvan tagon komenciĝis la belaj, vintraj, neĝaj aventuroj de la du fratinoj sur la belaj montoj, pri kiuj ili revis jam de tiom longe. – Estas tre bone! Jes! Dankon! – aŭdiĝis la infanaj ĝojkrioj.

Finite la legadon, Ulideto estis iom konfuzita. Li ne vere komprenis la intencon de Avinjo. Li tute ne ŝatis konfesi sian nekomprenon, sed foj-foje tio tamen estis necesa. – Avinjo, mi tre ŝatis tiun ĉi rakonton. Vere! Sed... sed mi ne komprenas kial estis tiom urĝe legi ĝin antaŭ la vespermanĝo. Mi eĉ ne finis ankoraŭ miajn hejmtaskojn kaj... – Kaj nun vi iros rapide fari ilin antaŭ la vespermanĝo kaj ĉio estos en ordo. Rilate vian alian demandon, vi mem malkovros la respondon tre baldaŭ. Rapidu!

Avinjo pravis: Ulideto tre rapide (tamen bone!) finfaris siajn hejmtaskojn kaj kun la pli frua trista mieno sidiĝis ĉe la tablo. La aliaj familianoj ĝoje diskutis pri la proksimaj ski-ferioj kaj... pri iu surprizo. Ulideto nur duon-orele aŭskultis ilin, tamen tuj kaptis la esencon de la konversacio. Li tute ekscitiĝis kaj jam ĝojkrie demandis la gepatrojn: „Ĉu vere? Ĉu vi vere permesas, ke mi invitu amikon, MIAN amikon por la ferioj??? Vi estas la plej bonaj gepatroj de la tuta mondo!!! Dankon! Dankon! Dankon! Tio estis mia revo, kiel la montaro por la du fratinoj.” Kaj en tiu momento li sentis sin la plej feliĉa infano en la mondo.



Esperanto-Semajno en Ĉinio

Inter la 16-a kaj 20-a de decembro 2019 okazis la 7-a Esperanto-Semajno de la elementa lernejo Baiyangshujie en la urbo Taiyuan de la provinco Shanxi, norda Ĉinio.

Temis pri “ĉina spirito, monda rigardo”. Dum unu semajno okazis diversaj eventoj pri Esperanto por pli ol 1 500 lernantoj, instruistoj kaj gepatroj.

La malferma ceremonio konsistis el tri partoj: retrorigardo al la antaŭaj Esperanto-semajnoj, disdonado de Weilun-stipendio kaj arta prezentado. Profesoro Li Weilun de Pekina Lingva kaj Kultura Universitato estis invitita partopreni la eventon de la lernejo en julio. Li estis kortuŝita de la Esperanta etoso en la lernejo kaj decidis donaci 40 000 juanojn (= 5 700 usonajn dolarojn) ĉiujare, kiel Weilun-stipendion por subteni Esperantan lernadon kaj aktivadon en la lernejo.

Dume, okazis la tagmeza radio-elsendado “Voĉo de Esperanto”, nedeviga kurso de Esperanto, Esperanto-ekspozicio kaj interagoj. Krome okazis prelegoj, kiujn



faris profesoro Gong Xiaofeng (Arko) de Nanchang-a Universitato kaj sinjorino Yu Jianchao, prezidento de Pekina Esperanto-Asocio. La prelegoj allogis ĉirkaŭ 700 gepatrojn kaj instruistojn, kio helpis ilin pli bone koni la lingvon. La gepatroj esperis, ke iliaj infanoj konos kaj lernos Esperanton.

“Esperantan Voĉon” prezidis kelkaj Esperanto-instruistoj de la lernejo, kaj multaj lernantoj partoprenis. En la programo lernantoj diskonigis sciojn pri Esperanto al siaj samlernejanoj, ekzemple rakontojn pri famaj esperantistoj, historion kaj disvolviĝon de Esperanto. Lernantoj ankaŭ esprimis senton pri Esperanto-lernado, kaj montris al la aliaj siajn plej ŝatajn vortojn.

Interagoj estis plej atentataj. Lernantoj en amuza etoso lernis novajn vortojn kaj frazojn. La nedeviga kurso allogis multajn lernantojn. Kelkaj el ili jam havis Esperanto-lecionojn, kaj multaj aliaj ankoraŭ ne lernis Esperanton.

Ekde 2008 Esperanto fariĝis speciala kurso de la lernejo. Ekde 2013 ĉiujare okazas Esperanto-Semajno en la lernejo. Nun Esperanta kulturo jam estas grava parto de la lernejo.

Zhao Wengi





La kato kiu nomiĝis Neĝopilko

Iam ie en la fora Nordio vivis blanka katinjo, kiun oni nomis Neĝopilko. Ŝia hejmo estis tre taŭga kaj komforta.

Dum frosta vetero vintre ŝi dormis kaj ronronis¹ sur la sofo kaj foteloj en la tagĉambro. Se venis gastoj, kun kiuj ŝi ne volis konatiĝi, ŝi kaŝiĝis malantaŭ la kurtenojn, kiuj pendis de la plafono ĝis la planko. Sian manĝujon ŝi havis en la ĉiam varma kuirejo apud la fornelo². La enloĝantoj de la domo donis al ŝi bongustajn fiŝaĵojn, viandaĵojn kaj lakton. Ili ne volis aĉeti por ŝi la katmanĝon de la vendejo. Neĝopilko estis tute kontenta. Dufoje jare ŝi naskis idojn, kaj tiam ĉiuj dorlotis ŝin kaj ŝian idaron, sed ial la katidoj malaperis post du monatoj. Tamen ĉiuj sciis, ke venos novaj, tial neniu longe malgajis. Somere la posedantoj de la domo lasis Neĝopilkon libere ludi en la grandaj korto kaj ĝardeno. Ŝi tre ŝatis tion, sed ekster la ĝardenon ŝi ne rajtis iri, ĉar la leĝoj de tiu lando malpermesas al katoj kaj hundoj la liberecon migri laŭplaĉe. Ili ja povus



Statuo de Neĝopilko. Foto: Saliko

feki kaj pisi en ludoparkoj kaj sablejoj de infanoj. Tial oni ligas la katojn kaj hundojn per rimeno, se oni promenas kun ili ekster la propra korto.

Neĝopilko estis bela kaj lerta katinjo. En la korto kaj ĝardeno ŝi kaptadis etajn bestojn kiel musojn. Ŝi provis kapti ankaŭ erinacojn, sed ili defendis sin. Endome ŝi provis kapti muŝojn, kiuj somere zumis kaj sunumis sin ĉe la fenestroj. Kelkfoje ŝi saltis post papilioj. Bedaŭrinde ŝin plej multe interesis birdetoj. En la ĝardeno nestis merlo kaj du muŝkaptuloj, unu en ligna nestujo sur la plej maljuna pomarbo. Neĝopilko kutimis sidadi sub la arbo kaj atenti kaj gvati la birdojn. Kiam la idoj de la muŝkaptuloj eloviĝis kaj ekpepadis, Neĝopilko ne povis ne grimpi al la nestujo. Feliĉe la enir-truo tamen estis tro malgranda por ŝia kapo, kaj ŝia piedo estis tro mallonga por atingi la veran neston. Ŝiaj posedantoj rimarkis, ke ŝi estos danĝera por la bird-idaro. Kiam la bird-idoj komencis lerni flugi, Neĝopilko sukcesis kapti unu, kiu ne sciis, kiel reflugi supren de la grundo. La gemastroj tute ne ŝatis la bonŝancon de sia katinjo. Ili komencis riproĉi kaj instrui ŝin, ke ŝi



Birdeto fotita de Dorota Burchardt, Pollando

1) Katoj ronronas ("ronkas"), kiam ili kontentas.
2) Fornelo = metala kuiraparato (formo)



Nestujo en la plej maljuna pomarbo.

Foto: Saliko

ne ĉasu birdojn, sed ŝi ne komprenis, ne obeis. Fine la dom-posedantoj ne sciis kion fari. Ili serĉis en la reto por trovi iun, kiu povus helpi. Tamen ili ne volis mortigi Neĝopilko. Tial ili decidis dungi magiiston por plibonigi la konduton de la kato.

En la interkonsentitaj tago kaj horo la iluziisto Nubĉjo surteriĝis sur la korton de la hejmo de Neĝopilko. Li lerte eliĝis el la korbo de sia ruĝe brila aerostato. Li ligis la aerostaton al la pomarbo, salutis kaj demandis, kion oni deziras de li.

– Bonvolu sorĉi nian blankan katinjon, ke ŝi ne plu volu ĉasi birdojn, elbuŝigis la kat-posedantoj.

– Malfacile, malfacile, respondis li. Tio ja estus kontraŭ ŝia naturo. Sed mi provos trovi ion. Li elprenis sian saĝtelefonon kaj ekfingrumis ĝin.

– Iun magiaĵon vi certe trovos, kuraĝigis lin la posedantoj de la katino.

– Ho, jes, jes. Mi povas igi ŝin senmova. Aŭskultu!

*Malmoviĝu katinjo kara,
via deziro ne estas rara.
Birdojn savu,
floroj vin ravu!
Hoks Poks Pam!*


Kaj HOPS kaj HU! Neĝopilko fariĝis ŜTONA STATU'! Nur ŝiaj okuloj ĉaseme brilis. Verdire la posedantoj malgajiĝis. Ho ve, la katinjo ne plu gajigos ilin per siaj saltoj, petolado kaj transkapiĝoj. Ne plu ŝi ĉarme rulos sin en la herbejo, nek ronronos sur la sofo. Neniam plu ŝi ĝue lekos siajn piedetojn kaj purigos sian tutan felon. Neniu homo karesos ŝin, ĉar ŝi ne plu molas, sentas kaj vivas.

– Ĉu vi ne povas elpensi iun alian manieron sendanĝerigi la katon? – la posedantoj demandis la magiiston Nubĉjo.

– Hmm. Se vi ne deziras la statuon, mi prenos ĝin kun mi en mian reĝlandon, kie ĉiuj estaĵoj rehavas sian liberecon, sed neniu povas ĝeni aŭ mortigi la aliajn.

Poste sinjoro Nubĉjo metis la statuon en la korbon de la aerostato, kiun li malligis de la pomarbo, kaj ili forflugis. La surprizitaj homoj ilin sekvis per siaj okuloj, ĝis la ruĝa aerostato iĝis ne plu videbla.

Saliko

Kato fotita de ŝia posedantino
Stina Lång.



90-jara “Amika Rondo”

Ĉi-jare nia klubo
“Amika Rondo” en
Sundsvall, Svedio,
festis sian 90-jaran
datrevenon.



Daŭre restas protokoloj kaj gazet-artikoloj de la unuaj jaroj. Malnovaj Esperanto-libroj senkoste estis disdonataj al la nunaj membroj, kaj ni rakontis, kial ni mem lernis Esperanton, kaj kiamaniere ni uzis la lingvon. Lernantoj de la lasta kurso pagis membrecon de la klubo kiel kurskotizon. Parto de la membroj estis jam membroj plurajn jarojn kaj multon spertis de la Esperanto-vivo pere de vojaĝoj kaj korespondado. Kiam venis eksterlandaj esperantistoj al nia klubo, ni aranĝis komunajn vizitojn al privataj hejmoj. Vigligas la klubon la vario de landa

deveno de la membroj, ekzemple Svedio, Finnlando, Hispanio, Rusio, Kanado kaj lastatempe ankaŭ Koreio kaj Armenio. Ni povas kompari vortojn, esprimojn, kaj eĉ vivmanierojn diverslande.

La lasta kurso daŭras ankaŭ en 2020, kaj la tute nova ankaŭ. Ĉiuj uzas la lernolibron *Esperanto per rekta metodo* de Stano Marček, kaj multe helpas, ke la libro estas havebla en la gepatra lingvo de ĉiuj lernantoj. Temas pri la plej bonaj lecionoj, kiam la lernanto ne tute regas la svedan lingvon. Okazis, ke nusa lernantino per sia ruslingva libro klarigis al alia, kiu pli bone komprenis la klarigon en la rusa, ol en la sveda lingvo.

Ili tute samopinias, ke Esperanto pli facilas ol la sveda.

Mia edzo Åke Näsholm gvidas la kurson por progresantoj kaj mi por la komencantoj.

Mi montris la gazeton “Juna amiko” al ili, kaj ili tuj akceptis aperi sur foto en ĝi. Kaj ili rigardis la foton de la redaktoro, kiu jam estas iomete konata al la grupo.

Ingrid Näsholm
prezidantino de la klubo



Legu kaj ĝuu

Rubrikestro: Małgosia Komarnicka,
ul. Kilińskiego 14/3,
PL-59-300 Lubin,
Pollando, rete:
malgosia.
junaamiko@gmail.com



Mi lernas kun la klaso

Mi nomiĝas Julia kaj mi havas 8 jarojn. Mi loĝas en Varsovio, la ĉefurbo de Pollando, la naskiĝurbo de Esperanto. Mi estas lernantino de la privata bazlernejo DIDASKO. Mi ŝatas danci, kanti, legi kaj desegni.

Nia lernejo de oktobro partoprenas en tutpollanda programo "Mi legas kun la klaso". Tio signifas, ke ĉiu lernanto legas ĉiutage sian ŝatatan libron dum 15-20 minutoj. Nia unua leciono, en ĉiu lerneja tago, komenciĝas per legado (vidu la foton) kaj dum semajnofinoj ni legas hejme.

Tiu komuna legado jam donis pozitivajn rezultojn, ĉar ni pli lernas, kaj tiuj, kiuj ĝis nun ne ŝatis legi, legas volonte. Ni rimarkis, ke danke al legado tre pligrandiĝis nia scio; ni pli bone envortigas; ni estas pli amike direktitaj unu al la alia kaj ni volonte rekomendas al ni reciproke librojn.



Al mi ege plaĉas tiu projekto, ĉar mi ŝatas legi jam de mia bebtempo (vidu la foton), sed ankaŭ tial, ke mi povas legi tion, kion mi volas, kion mi mem elektos. Kun plezuro mi kunportas al la lernejo miajn ŝatatajn librojn. Mi rekomendas, - legu ĉiutage viajn ŝatatajn librojn dum dekelkaj minutoj, kaj vi atingos profitojn, pri kiuj vi eĉ ne revis...

Bonvolu tralegi mian rekomendon...

Klubo de bona libro

Biblioteko de *Juna Amiko* por junuloj kaj infanoj kreskas

danke al viaj proponoj. Bonvolu sendi viajn proponojn de libroj, kiuj montras pozitivajn valorojn (ekzemple toleremon, amikecon, apogon al malpli fortaj homoj), helpas kompreni vin mem kaj aliajn, kaj ebligas adaptiĝi al nia iom malgaja realeco. La proponojn kun la titolo, aŭtoro kaj mallonga rekomendo, bonvolu sendi al la supra adreso, aldonante la noton: Biblioteko de *Juna Amiko*.



Legu, legu, legu!

Rekomendo

Por Biblioteko de *Juna Amiko* Julia rekomendas librojn pri vojaĝoj de Nela, la plej juna vojaĝantino kaj raportistino de la mondo. Ŝi gajnis multege da premioj kaj fariĝis fama inter infanoj kaj iliaj gepatroj. Nela malgraŭ sia famo konstante estas tre modesta knabineto. Ŝia idolo estas Steve Irvin kaj kiel li, ŝi ankaŭ estas tre impresebla je la dolorego de bestoj kaj deziras helpi protekti la mondon.

Nela ŝatas naturon kaj ekspediciojn, kaj tial volonte vojaĝas kun siaj gepatroj. Ŝi komencis vojaĝi havante kvin jarojn kaj ĝis nun ŝi vizitis preskaŭ ĉiujn kontinentojn. Ŝi priskribas kaj registras siajn aventurojn kaj ankaŭ eldonas ilin libroforme helpe de sia patrino. Plej ofte ŝiajn librojn eldonas la eldonejo National Geographic. La libroj de Nela estas ege popularaj. Ili instruas, priskribas malproksimajn landojn kaj kulturojn, kaj vekas apetiton de infanoj por vojaĝi kaj ekkoni la mondon.


La vera nomo de Nela ne estas konata pro protekto de ŝia privateco, ĉar ŝi estas ankoraŭ infano.

Legante la librojn de Nela ni sentas nin kvazaŭ ni mem vojaĝas kaj travivas



Malgranda Julia legas.

belegajn aventurojn. Tial mi ege ĝojas, ke unu el ŝiaj libroj fariĝis lerneja legado en bazlernejo en Pollando. Danke al tio ankoraŭ pli da gelernantoj malkovros ŝiajn librojn...





Ekkonu mian landon pere de ĝia legendo

Konkurso ne nur por junaj legantoj.

Rubrikestro: Małgosia Komarnicka.

Ĉi-numere mi proponas denove viziti Pollandon kaj precipe ĝian sudokcidentan parton, Malsupran Silezion. Kial mi elektis tiun parton de mia lando? La respondo estas tre simpla.

Ĉi tie maje ĉiujare okazas Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj, Internacia Simpozio, Vortbeleco en Esperanto kaj Interkultura Majrendevuo. Detalojn pri tiuj eventoj vi trovos, legante la rubrikon de Elena Nadikova.

Bonvolu preni mapon, trovu Pollandon kaj per kelkaj informoj, trovitaj en interreto, konatiĝu kun ĝi. Poste tralegu la rubrikon kaj klopodu trovi sur la mapo la menciitajn lokojn – kaj fine faru konkursajn taskojn.



Pollando (pole: *Polska*, *Rzeczpospolita Polska*) prezentas specifan ĉarmon, neripeteblan etoson, gastamajn kaj bonkorajn homojn, belegajn vizitindajn lokojn kaj interesajn allogaĵojn. Pollando estas ankaŭ la patrujo de Ludoviko Zamenhof, la kreinto de la lingvo Esperanto, kaj Pollando estas, do, ankaŭ la patrujo de Esperanto. La ĉefurbo de Pollando estas Varsovio (pole: *Warszawa*), situanta apud Vistulo (pole: *Wisła*), la plej longa rivero de la lando. En Varsovio naskiĝis Esperanto kaj do Varsovio estas naskiĝurbo de Esperanto.

Pollando troviĝas en la mezeŭropa tempa zono. La klimato de Pollando estas modera, someroj kutime estas varmaj kaj vintroj – mildaj.

En la norda parto de Pollando estas lagoj kaj malaltaĵoj, en la meza parto estas grandaj ebenaĵoj kaj malprofundaj riveraj valoj, kaj en la sudo troviĝas altaĵoj kaj montaroj. Poloj estas slavoj kaj ili parolas la polan lingvon, kiu apartenas al la familio de slavaj lingvoj. La oficiala mono estas zloto (pole: *złoty*).

Kaj ĉu vi scias, ke en Pollando, en Suchowola apud Sokółka, troviĝas la geometria centro de Eŭropo?

En sudokcidenta parto de Pollando troviĝas Malsupra Silezio (pole: *Dolny Śląsk*). La ĉefurbo de la regiono, unu el 16 vojevodioj de Pollando, estas Vroclavo (pole: *Wrocław*). Ĝi situas ĉe la rivero Odro (pole: *Odra*), en la valo de la rivero, kaj ĝi estas la kvara plej granda urbo de Pollando kaj havas landskalan signifon



Kio allogas min en
Malsupran Silezion
en Pollando?



kiel scienca, kultura kaj ekonomia centro. Vroclavo ofte estas nomata “la urbo de renkontiĝoj”. La urbo estas granda vojkruciĝo de la aŭtomobila, fervoja, ŝipa kaj aviadila trafikoj. Gravaj enlandaj kaj internaciaj vojoj trairas la urbon.

Dum la dua mondmilito, rezulte de la longdaŭraj bataloj, la urbo estis detruita sepdek-procente. Ĝi estis kaj estas zorge rekonstruata kaj renovigata.



Ĉiu vizitanto certigos pri komforto, altkvalitaj priservoj kaj tre bongusta pola kaj internacia kuirarto. Ĉi tiu regiono de multaj eblecoj, kiu allogas per bela pejzaĝo kaj abundo da naturo, multaj antikvaĵoj kaj kuraĉlokoj, estas interesa eduka kaj ekonomia oferto. Eblas partopreni kulturajn aranĝojn, spektaklojn, koncertojn kaj festivalojn.

Laŭ la pola-ĉeĥa limo etendiĝas Sudetoj (pole: *Sudety*, longas ĉ. 300 km), montĉenoj kaj montmasivoj. Sudetoj dankŭldas sian pitoreskecon al fantaziaj rokformoj, profundaj rivervaloj, malkrutaj akvofaloj, arbarkovritaj montosuproj kaj sur la pintaj etaĝoj, ankaŭ al postglaciaĵaj skulptformoj. La plej alta montĉeno de Sudetoj estas Gigantmontaro (pole: *Karkonosze*, 1350-1450 m). La montaro konsistas el granito kaj metamorfa ŝtonaĵo, kaj ĝian grandan parton kovras piceaj arbaroj. Ĝia plej alta pinto nomiĝas Neĝulo (pole: *Śnieżka*, 1603 m), kies nomo signifas “kovrita de neĝo”. La plej belajn partojn de la montoj formas Gigantmontara Nacia Parko (pole:



Vroclavaj antikvaĵoj (vidu pasintjaran numeron de JA) oni povas viziti je diversaj manieroj, piede, bicikle, trame, individue aŭ kun ĉiĉerono. Mi rekomendas viziti Vroclavon serĉante koboldojn, la plej malgrandajn loĝantojn de la urbo.

Oni povas diri, ke Malsupra Silezio troviĝas en la centro de Eŭropo.

Trafluenta tra Malsupra Silezio, la rivero Odro estas unu el la simboloj de la regiono. Ĝi estas perfekta trapasa vojo inter Malsupra Silezio kaj baltamaraj havenoj, kaj per la reto de kanaloj ĝi ligiĝas kun la tuta meztera sistemo de akvaj vojoj en Eŭropo. Tipaj trajtoj de la regiono formiĝis dum jarcentoj de komplika multnacia historio. En ĉi tiuj kondiĉoj kreiĝis nova socio, malfermita al la mondo, kiu estas konscia pri sia eŭropa heredaĵo.





Karkonoski Park Narodowy). Ĉi tiu montara regiono de Malsupra Silezio estas bone ekipita laŭ la turisma vidpunkto. Ĉiujn turisme interesajn lokojn oni povas ekkoni piede, aŭ per aŭto. La plej bona sezono por montmigrado estas majo kaj junio, ankaŭ aŭgusto kaj septembro.

De decembro ĝis aprilo eblas praktiki vintrajn sportojn, skiadon kaj sledadon.

Diferencan karakteron de la regiono kreas fantaziaj formoj de rokaj fungoj, turoj kaj labirintoj. Ĉi tie ankaŭ troviĝas multaj mineralaj fontoj kaj kuraclokoj, kiuj estas samtempe gravaj turismaj kaj ripozaj centroj, kiel Kudowa Zdrój (Moniuszko-festivalo), Polanica Zdrój, Duszniki Zdrój (Chopin-festivalo). Malsupra Silezio famas pro multaj pitoreskaj malnovaj urbetoj kaj vilaĝetoj. Laŭ la pejzaĝo la plej interesa estas la valo de la rivero Barycz, kie ĉi-maje ni planas organizi Interkulturan Majrendevuon. En la arbaroj de la valo estas riĉo da fungoj kaj beroj. La industrio de ĉi tiu regiono ligiĝas kun elterigo kaj alifarado de kupro (Lubin, Głogów, Polkowice).

Vizitante Malsupran Silezion mi rekomendas viziti ankaŭ aliajn urbojn, interalie Karpacz. ➤

Ĝi estas konata centro de turismo, ripozo kaj vintraj sportoj. Ĉi tie troviĝas unika ligna preĝejo Wang (el la 12-a jc.), venigita tien en la 19-a jarcento el Norvegio, sed ankaŭ Muzeo de Pupoj, Muzeo de Sporto kaj Turismo. Henryków, kie troviĝas la konata grandioza abatejo de Cistercianoj, unu el la plej malnovaj en Pollando (13-a jc.),



Kłodzko, kie valoras vidi antikvajn konstruaĵojn, ekz. la fortreson, kiu estis konstruita en sia nuna aspekto de la prusa reĝo Frederiko la Granda.

Ĝiaj subteraj kazematoj¹ kaj profunda kelsistemo etendiĝas sub la tuta urbo. Krzeszów estas negranda vilaĝo, fama pro la abatejo de Cistercianoj (13-a jc.) kaj ĝian klostran² preĝejon oni opinias perlo de la silezia baroka arkitekturo. Legnica estas unu el plej malnovaj urboj de Silezio. Ĝi konservis antikvan urboplanon, Maria-preĝejon (14-a jc.), gotikan preĝejon kun sanktaj Petro kaj Paŭlo (14-a jc.), kastelon de princoj de Legnica-Brzeg. La vilaĝo Lubiąż famas pro altklasa antikvaĵo, Abatej-Komplekso de Cistercianoj, unu el la plej grandaj kaj valoraj de tiu tipo en Centra Eŭropo. Oleśnica estas fama pro gotik-renesanca kastelo (14-16-a jc.) kaj kelkaj gotikaj kaj barokaj preĝejoj. Opole estas grava kultura, kleriga kaj scienca centro kun kelkaj gotikaj-renesancaj brikdometoj, katedralo de Sankta Kruco (13-14-a jc.), preĝejo de Franciskanoj (14-a jc.). En la urbo Świdnica valoras viziti ĉefe Preĝejon de Paco, kiu estas sendube grava trezoro de Malsupra

Silezio. Ĝi estas unu el la plej grandaj lignaj preĝejoj en Eŭropo kaj en la jaro 2001 ĝi estis enskribita en la liston de Mondaj Kulturaj Heredaĵoj de Unesko. Trzebnica estas malnova antikva urbo kaj pitoreska somerumejo, konata pilgrimloko, ligita kun la kulto de Sankta Jadwiga. Ĉi tie troviĝas la plej monumenteca



1) Kazemato = bunkro, subtera ĉambro

2) Klostro = monaĥejo kun kovrita promenejo



antikvaĵo – Abatejo de Cistercianoj, kun klostro kaj preĝejo (13-a jc.) kaj unu el la plej malnovaj preĝejoj en Silezio.

Mi kore invitas vin maje al Vroclavo por viziti Malsupran Silezion.

Legendoj

Mi elektis ĉi tiujn legendojn, por ke vi havu la eblecon ekkoni ankaŭ aliajn urbojn de Malsupra Silezio, kiujn mi ne menciis en la antaŭa teksto.

Blanka Sinjorino

Sucha estas setlejo en Malsupra Silezio. Ĉi tie ➤ troviĝas defenda Kastelo Ĉoĥa (pole *Zamek Czocha*). Kun tiu loko jam de la mezepoko estas ligitaj multaj enigmaj rakontoj. Se vi ne timas – aŭskultu pri Gertruda, nomata Blanka Sinjorino, kiu je la noktomezo vagabondas en la kastelo. En antaŭaj tempoj Gertruda havis fraton, kun kiu ŝi malpacigiĝis. Ŝi deziris venĝi sin. Al la kastelo ŝi per kaŝita enirejo enkondukis malamikojn de la frato, kiuj ricevis malavaran salajron.

Kiam la frato post iom da tempo venkis siajn malamikojn kaj regajnis la kastelon, la perfidulinon oni juĝis kaj senkapigis en la kastela korto. Oni diras, ke ŝin eĉ en infero oni ne volis, kaj do ŝi konstante estas en la kastelo kiel fantomo. Tamen oni povas helpi al ŝi. Tion povas efektiviĝi nur persono, naskita dimanĉe, kaj havanta puran koron. Blanka Sinjorino, promenante en la kastelo, kaj vidante iun personon, disjetis monon, kiun oni ricevis de malamikoj de ŝia frato. Se tiu persono ekpensos pri la mono, tiu jam ne povos helpi al Gertruda liberigi sin. Ĝis nun ankoraŭ neniu sukcesis, ĉar ĉiu, vidante monon, tuj komencas kolekti ĝin...



Minejkoridoro Gertruda

Złoty Stok estas unu el la malnovaj min-fandejaj centroj en Pollando. Lastan minejon oni fermis en 1961. De tiu momento la urbo fariĝas turisma centro kun fama orminejo (*Muzeum Górnictwa i Hutnictwa Złota*). Subtera turisma vojo kondukas tra Minejkoridoro Gertruda.

En antaŭaj tempoj, kiam okazis akcidento en minejo, decidon pri savagado entreprenis posedanto de la minejo. Li unue kalkulis, ĉu tio estos valora por liaj financoj. Li plej ofte ne pensis pri savado de la vivo de ministoj.

Iun tagon en la orminejo okazis akcidento, kaj la posedanto decidis ne helpi al la ministoj. Tiam Gertruda, edzino de unu el tiuj ministoj, decidis trovi sian edzon kaj helpi al aliaj. Ŝi eniris la labirinton de la koridoroj – kaj neniam revenis. De tiu tempo, kiam ministro perdas vojon, li aŭdas virajn paŝojn, kaj irante laŭ la sono li trovas enirejon. Oni kredas, ke helpas al ili Gertruda.

Kurba Turo

Ząbkowice Śląskie estis en mezepoko grava juĝa centro. Post la dua mondmilito ĝi perdis sian gravecon. Tamen indas viziti ĝin, por admiri la plej altan kurban turon en Pollando. Ĝi estas 34 metrojn alta kaj deflankiĝo de la vertikalo estas pli ol 2 metroj. Por atingi ĝian pinton oni devas trapasi 139 ŝtupojn. La turo havas sian feston, julie, ĉiun duan semajnfinojn. Tiam oni povas viziti la turon ĝis la noktomezo. Dum multaj jaroj oni provas trovi ĝustan klarigon, kial la turo estas kurba. Estas kelkaj klarigoj, sed la plej serioza estas tia, ke la konstruisto speciale planis tiel konstrui la turon. Ĝis la 19-a jarcento sur la muro de la turo estis tabulo kun klarigsurskribo.





Mireille Grosjean

Kiom stultan
ideon mi havis...

Ĉu Schubert
estis japano ?

**Kiam mi restadis en Japanio,
mi foje eniris kun amikino
en muzikvendejon, ĉar mi
volis aĉeti kajeron kun japana
tradicia muziko.**

Enirante ni aŭdis belegan muzikon, eŭropstilan, klasikstilan, teknike perfekte aŭdigan; mi supozis, ke la komponisto estis Schubert, la aŭstra komponisto kaj pianisto de la deknaŭa jarcento. Tuj mi sentis min hejme.

Tuj mi ŝatis tiun momenton, ĉar mi ludis violonon, kaj partoprenis en diversaj orkestroj, do ĉiuj tiuj ĝojaj muzikaj momentoj revenis al mia memoro. Mi diris al mia amikino:



“Jen, aŭskultu ! Tio estas mia muziko!” Mia amikino respondis: “Ne, Mirejo! Tiu muziko apartenas al la tuta mondo!”.

Esperantistoj havas la devon “... kredi, ke neniu popolo havas la monopolon de la civilizeco, de la kulturo aŭ de la humaneco. Nia civilizeco estas ŝuldata al la pensuloj, apartenantaj al la plej diversaj gentoj, el kiuj kelkaj jam delonge malaperis el la historio; ĝi disvolviĝis danke al la sinsekva laboro de ĉiuj popoloj; ĝi estas la verko ne de tiu aŭ alia nacio, sed de la diverslandaj elitoj. Sendube, la popoloj ne same laboris kaj ne samtempe elmontris sian ĉefan agadon. Ni scias, ke tute samaj ili ne estas, sed ĉiu el ili alportis aŭ alportos ion originalan al la komuna posedaĵo de la homaro. Iu pli fervore sin dediĉas al la teknika kulturo; ĝi akiras la severan ordon, kiu ĝin regas.

Al tiu alia pli plaĉos la interbatalado de la ideoj, la studo de la homo, la literatura kulturo. Alian priokupos pli speciale moralaj problemoj, kiuj sieĝas ĝian maltrankvilan animon. Alia dediĉos sian praktikan genion al la vastaj entreprenoj de la komerco. Kiu povus diri: tiu ĉi estas pli utila ol tiu? Ĉu pli utila estas la panisto, kiu nutras nin, la tajloro, kiu vestas nin, aŭ la pensulo, kiu nin instruas?”

El *Super*, de Hector
Hodler, jan. 1915.

La Konkursa Tasko

estas jena: Redaktu 20 demandojn al la tuta teksto de “Ekkonu mian landon pere de ĝia legendo”.

Se vi ŝatas desegni aŭ pentri, sendu al ni bildo(j)n, kiu(j) bildforme prezentos legendojn.

La konkursan taskon bonvolu sendi kun viaj nomo, adreso kaj indiko “Konkurso

– legendo” ĝis la 30-a de marto 2020 al la adreso:

Europejskie Centrum Edukacji
Międzykulturowej, ul. Kołłątaja 26A,
PL- 50-007 Wrocław, Pollando


La valorajn premiojn fondis Eŭropa
Centro de Interkultura Edukado
(pole: *Europejskie Centrum Edukacji
Międzykulturowej*).



Luiza Carol

La infana rakontisto

Pri “*Steĉjo-fabeloj*” de Julia Sigmond. Ilustris Ágota Kőnczey. Eldonejo Exit, Kluĵo 2018, 68 paĝoj.



La protagonisto de tiu libreto estas Steĉjo, infaneto, komencanta viziti la infanĝardenon. Ĉiu ĉapitro fokusigas al iu interesa evento, kiun Steĉjo spertas dum la unuaj monatoj en la infanĝardeno de “Onjo Eva” (tiel la infanoj nomas sian amoplanan kaj saĝan infanvartistinon).

Antaŭ ol viziti la infanĝardenon, Steĉjo erare supozis, ke knabinoj ne ŝatas ludi per konstrukuboj, kaj ludado per pupoj estas seninteresa por knaboj. Sed Onjo Eva kuraĝigas ĉiujn infanojn ludi per ĉiuj ludiloj. Unu el la knabinoj eĉ klarigas al Steĉjo kial ludado per pupo estas utila por la estonteco. Ŝi diras:

“Kiam vi estos granda kaj via edzino havos iun laboron, kio okazus, se vian fileton vi ne povus bani, vesti kaj manĝigi?”

Tiuj argumentoj konvinkas la etan Steĉjo ekludi kun pupo, kaj je sia miro li ja ĝuas tiun sperton, precipe kiam li “manĝigas” ĝin, fakte manĝante mem bongustajn pompecetojn. Ĉu ankaŭ vi konas knabojn, kiuj havis similajn spertojn?

Aliaj ĉapitroj priskribas aliajn aspektojn de la infanĝardeno vivo: vizito al belega botanika ĝardeno, vizito al pupteatro, organizado de festo okaze de la naskiĝtago de Onjo Eva, organizado de spektaklo fare de pluraj infanĝardenoj de la urbo ktp.

Inter la eventoj plej ŝataj de la infanoj estas la “fabelhoroj”, kiam Onjo Eva legas al ili po unu fabelon. Sed la protagonisto de la libreto, Steĉjo, estas talenta infano, kiu elpensas siajn proprajn fabelojn kaj


lia patrino surpaperigas ilin en kajeron. Steĉjo eĉ revis fariĝi “Oĉjo Fabelisto” kiam li plenkreskos. Kiam la infanoj eksciis tiun sekreton, ili tuj scivolis aŭskulti la fabelojn de Steĉjo. Nun vi jam divenas kial la libro nomiĝas “Steĉjo-fabeloj”, ĉu ne?

Jes ja, Onjo Eva invitis lin foj-foje rakonti siajn proprajn fabelojn dum la “fabelhoroj”. 4 el la ĉapitroj de la libreto estas dediĉitaj al po unu fabelo de Steĉjo. Do entute vi trovos en la libreto 4 Steĉjo-fabelojn, kaj tio signifas ke triono el ĉiuj ĉapitroj prezentas “Steĉjo-fabelojn”. Ĉu vi scipovas kalkuli kiom da ĉapitroj havas la libreto?

Kompreneble, la “Steĉjo-fabeloj” estas la plej ekscitaj partoj de la libro, ĉar Steĉjo kapablis elpensi fantaziajn protagonistojn kaj fantaziajn eventojn. Ekzemple, li rakontis fabelon pri vagabonda steleto, kiu perdiĝis malproksime de sia stelfamilio. Alia Steĉjo-fabelo temas pri virino, kiu kapablis mirakle aperigi belegajn florojn por la urbo. En alia rakonto de Steĉjo aperas maljunulino, kiu trovis sorĉitan horloĝon monon-donantan. (Kion vi supozas, ke ŝi faris per la granda monsumo, kiun ŝi akiris? Kion vi mem farus per granda monsumo?)

La Steĉjo-fabelo, kiun mi pleje ŝatis, temas pri ronda arĝenta lago, kies akvo kuracis ĉiuspecajn malsanojn. Pri tiu lago ekzistis multaj onidiroj, sed neniu sukcesis trovi ĝin, do la sciencistoj supozis, ke ĝi estas fantaziaĵo. Tamen, spritaj homoj decidis aliformi tiun fantaziaĵon en realaĵon. Ili plenumis per akvo grandan rondan valon, kie kreskis multaj arĝentkoloraj plantoj, kaj la rezulto estis ronda arĝentkolora lago. Verdire, ajna pura akvo estas ege saniga por homoj kaj bestoj, precipe se oni uzas ĝin por prepari teon. Sen akvo neniu homo, besto aŭ planto povus ekzisti.

Kvankam la Steĉjo-fabeloj estis tiom belaj kaj interesaj, la plej granda surprizo,



kiun mi havis en la libreto, ne aperis en iu Steĉjo-fabelo, sed en la priskribo de iu spektaklo, kiun la infanoj preparis. Tiam evidentiĝis, ke en la ĝardeno de Onjo Eva la infanoj lernas Esperanton! Ili parkerigis iun amuzan kaj instruon poemon pri la Esperanta alfabeto kaj deklamis ĝin koruske! Temas pri iu speciala poemo, verkita de Inga Johanson, el kiu mi citos nur la unuajn du versojn:

*“A kiel afabla avo en Armenio
B kiel blua botelo en Bulgario...”*

Unu post la alia, pri ĉiu litero de la Esperanta alfabeto la aŭtorino verkis po unu version. Ĉu vi povas kalkuli kiom da versoj havas la tuta poemo?

Vi jam rimarkis, ke tiu poemo estas fakte ankaŭ tre amuza ludo, ĉu ne? Mi proponas al vi daŭrigi mem tiun ludon ĝis la fino de la Esperanta alfabeto.

Ĉu vi konas ajnan infanĝardenon, kie la infanoj lernas Esperanton? Se vi konas, bonvolu skribi pri ĝi al la redakcio de *Juna Amiko*. Mi konas neniun tian infanĝardenon. Eble ĝi eĉ ne ekzistas.

En la okazo, ke ĝi ne ekzistas, tio signifas, ke ĝi estas fantaziaĵo de la aŭtorino. Sed ajna fantaziaĵo povas aliformiĝi en realaĵon, samkiel en la fabelo pri la ronda arĝenta lago. Ĉu vi ŝatus, ke en via infanĝardeno oni instruu Esperanton? Mi sugestas, ke vi petu viajn gepatrojn organizi tiajn lecionojn. Kaj eble foje, kiam vi mem plenkreskos, vi mem organizos lecionojn pri Esperanto en infanĝardeno. Kial ne? Belaj fantaziaĵoj meritas, ke oni provu aliformi ilin en realaĵojn...

Sur la dorsa kovrilo de la libreto aperas malnova foto de eta knabo, kies nomo estis ĝuste Steĉjo, samkiel la protagonisto. Kaj sub la foto eblas legi tiujn klarigojn:

“Steĉjo ne iĝis oĉjo-fabelisto, sed vera verkisto. Por la plenkreskuloj li verkis strangajn rakontojn. Steĉjo iĝis Stefano: Stefano Sigmond (1936-2014). Memore al mia frato mi skribis ĉi fabelojn.”

Do, la verkistino Julia Sigmond kreis tiun libreton memore al sia frato. Tio signifas, ke Steĉjo estis vera knabo, kiu talentis pri fabelumado. Ĉu ankaŭ vi elpensis kelkfoje fabelojn? Se ne, ĉu vi ŝatus provi tion?

Blazio Vaha:

Post reta diskuto eta

*Esti bona estas bele,
esti bela estas bone.
Nin esprimi ĉiam trafte
ne nur por ni estas grave.*

*La okuloj vin beligas,
Via koro vin bonigas.
Onin kolerigas vanto,
ŝtelagado de fibando.*

*Bono estas, vere, bela;
belo estas, fakte, bona.
Estas grave eĉ aboni
Esperanton – kaj pludoni.*

*Kuraĝuloj estas bravaj!
Lerteguloj estas gravaj!
Blondaj haroj plej beligas!
Ruĝaj vangoj amindigas!*


*Nigras estu la okuloj!
Tiaj estas la beluloj!
Ili nigre okulumas.
Ĉirkaŭ buŝ’ ridetoj lumas.*


*Estu brava, estu bona,
tio estas tre impona.
Sed, pli grave, celu juston,
Donu panon, ne nur kruston.*

*Lerto estas konservenda,
saĝo estas multigenda,
sed plej grave estas fidi,
ĉiam novajn eblojn – vidi.*

Blazio Vaha (Balázs Wacha)

estas konata hungara esperantisto, poeto, verkisto kaj instruisto. Vidu pli ĉe: wikipedia.org/wiki/Balázs_Wacha





Rubrikestro:
Elena Nadikova,
Esperanto-klubo "Betuleto"
Lernejo/Ŝkola 56,
pr. Traktorostroitelej, 38
RU-428028 Ĉeboksari, Rusio
lena_espéro@mail.ru



Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj

Saluton, karaj legantoj!

Interkultura mondo ŝatas denove prezenti al vi neordinarajn eventojn, kie homoj povas sperti diversecon de nia Terglobo.

Temas pri Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj. Ĝi okazos jam la okan fojon en la pola urbo Vroclavo (Wrocław). Tamen la festivalo sendube meritas pli kaj pli da reklamo kaj disvastigo. Ja temas ĝuste pri interkultura evento, kiu okazas danke al nia internacia lingvo Esperanto. Do, ĉi-numere ni prezentas la festivalon pli detale. La ideo naskiĝis antaŭ 8 jaroj en Vroclavo. Ĝi estas urbo en la sud-okcidenta parto de Pollando. La ideo venis de Małgosia Komarnicka, fama pola esperantistino. Kunlabore kun siaj samideanoj ŝi okazigis la 1-an Eŭropan Festivalon de Esperantaj Kantoj la 17-an de majo 2013. Ĝi kaŭzis multajn malfacilaĵojn. Komence mankis reklamo,



mono kaj helpantoj. Laboro multis, ofte ĝi superis fortojn de la organizantoj. Tamen poste Małgosia ricevis grandan apogon de Mila van der Horst Kolińska (polino, esperantistino loĝanta en Nederlando, honora membro de Universala Esperanto-Asocio kaj Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj; Mila mortis en 2019). Tio multe helpis al la organizado.

La unua festivalo okazis en la pola bazlernejo Szkoła Podstawowa en Vroclavo. La honoraj patronoj estis Mila van der Horst Kolińska kaj profesoro Edmund Wittbrodt. Li estis tiama senatano de Respubliko Pollando, eksa ministro pri edukado kaj prezidanto de la pola Parlamenta Grupo Apoganta Esperanton.

La du unuaj festivaloj estis direktitaj nur al infanoj. Komence partoprenis nur dekelkaj infanoj. Ekde la tria festivalo Małgosia Komarnicka enkondukis ŝanĝojn. De tiu momento la festivalo estis direktita ankaŭ al plenkreskuloj kaj pliaĝuloj.



Horuso el Olesnica

2019/05/25 08:19



La dancgrupo Gracie, kun rozoj

La festivalo pligrandiĝis. Partoprenis en ĝi dum lastaj jaroj kutime pli ol 200 personoj. Inkluzive ankaŭ nevidantojn kaj malmultvidantojn. Komenciĝis kunlaboro kun Halina Kuropatnicka-Salomon, poetino kaj esperantistino. Ŝi ekgvidis sabatajn provaĵojn.

Kreiĝis la unua festivala estraro. Komenciĝis longdaŭra kunlaboro kun la franca kantisto, esperantisto JoMo (Jean-Marc Leclercq) kiel Esperanto-muzikstelo. La festivalo havas jam sian simbolon (projektitan de Oskar Komarnicki) kaj festivalan bildon (de Elżbieta Wodała) el sekigitaj plantoj. La presitaj afiŝoj estas dulingvaj.

Partoprenantojn prijuĝas internacia ĵurio. Traduke helpis Halina Kuropatnicka-Salomon kaj Andrzej Kraszewski.

Formiĝas tre bone kunlaboranta grupo de kelkaj personoj. Ili pene serĉas financan subtenon, ĉar ŝanĝiĝas la tempo. Jam ne sufiĉas entuziasmo, emo por labori. Necesaj estas grandaj financaj rimedoj por prepari Eŭropan Festivalon de Esperantaj Kantoj profesie. Ja, la festivalo havas gravan rolon. Ĝi stimulas lingvan kaj muzikan interesiĝojn de partoprenantoj. Ĝi disvastigas informojn pri la lingvo Esperanto. Ĝi prezentas ĝiajn valorojn kaj uzeblecon. Ĝi vigligas kunlaboron kun neesperantistaj medioj. Tial en la sekvaj jaroj la honoraj patronoj iĝis ankaŭ i.a. Universala Esperanto-Asocio kaj de kelkaj jaroj regule la revuo *Juna Amiko* kaj Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj. La ĉefa organizanto de la festivalo estas Eŭropa Centro de Interkultura Edukado

en Vroclavo kaj ĝia prezidantino Małgosia Komarnicka.

Eŭropa Centro de Interkultura Edukado aperis jure en 2016, sed fakte ĝi funkciis multe pli frue. Ĝi okupiĝas ĉefe pri multaj eventoj, kiuj rekomendas kaj reklamas Esperanton. Regule estas gvidataj Esperanto-kursoj. Okazas diversaj aranĝoj. Inter ili estas Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj, Internacia Simpozio, Interkultura Majrendevuo kaj Vortbeleco en Esperanto. Estas ankaŭ organizataj prelegoj, lekcioj, distraj renkontiĝoj, ekskursoj. Ekde januaro 2020, danke al Małgosia Komarnicka, funkcias Esperanto-Kafejeto. Ĉiun lastan lundon de monato tie kunvenas esperantistoj aŭ ĝiaj simpatianoj. Ili komunikas, babilas, teumas. Ĉio ne nur en Esperanto, ĉar la kafejeto vizitas pli da neesperantistoj, kaj pli facile estas transdoni al ili informojn pri la lingvo Esperanto kaj Esperanto-movado pole. Tio estas ege grava, ĉar danke al tio informoj pri Esperanto atingas pli da personoj.

Ekde 2015, danke al la iniciato de Małgosia Komarnicka, Eŭropa Centro de Interkultura Edukado komencis organizi **Internacian Simpozion**. Ĉiu simpozio estas dulingva, pole kaj Esperante. La prelegoj de eksterlandanoj estas senpere tradukataj pollingven kaj de la polaj prelegantoj – Esperanten.

Preparitaj simpozioj plenumas gravan rolon. Ili montras, ke eblas interŝanĝo de





sciencaj konkludoj kaj organiza kunlaboro de esperantistaj kaj neesperantistaj medioj. La organizantoj ĉiam zorgas pri la alta nivelo de la eduka aranĝo. Ili estas ege dankemaj al esperantistaj prelegantoj, kiuj propramone alvenas kaj prelegas.

Ĉi-jare, en 2020, probable jam la 6-a **Internacia Simpozio** okazos la 25-an de majo. „Probable“ – ĉar la organizantoj petas helpon de ĉiuj, kiuj povas alveni propramone kaj prelegi. Tio pruvas, ke Esperanto estas ankaŭ la lingvo de scienco. Ĉiuj simpozioj okazas en prestiĝaj lokoj.

Alia grava evento de la centro estas **Interkultura Majrendevuo**. Ĝi okazas tuj post kantfestivalo kaj simpozio. La rendevuo ebligas pasigi neforgeseblajn momentojn. Ĝiaj programeroj malstreĉigas per manlaboroj, kantado, babilado, dancado. La partoprenantoj vizitas belajn lokojn kaj havas multajn aliajn plezurojn. Ekzemple, en 2019, en Złotoryja, la rendevuanoj danke al helpo de Aleksander Pecyna serĉis... – oron! Ĉiu trovinto havis eblecon reteni ĝin. Ĉi-jare Interkultura Majrendevuo okazos jam kvinan fojon, probable (se estos partoprenantoj) en la valo de la rivero Barycz. Tio estas belega natura loko en la okcidenta Pollando.

La sekva interesa aranĝo de Eŭropa Centro de Interkultura Edukado estas **Vortbeleco en Esperanto**. Ĝi okazas decembre kaj konsistas el Konkurso de Deklamata Poezio kaj Konkurso de Laŭta



Legado. Tiun eventon gvidas la poetino kaj esperantistino Halina Kuropatnicka-Salamon.

Eŭropa Centro de Interkultura Edukado okazigas ankaŭ aliajn iniciatojn. En 2017 alvenis al Vroclavo el Francio reprezentantoj de Pluezekaj Renkontiĝoj. Ili invitis Małgosia Komarnicka kun kelkaj studentinoj de Esperanto-kurso viziti Bretonion. Ĉiuj pasigis tie belegajn momentojn kaj sentis sin kiel hejme. Tio estis impulso por prepari komunan vojaĝon de lernantoj de la Esperanto-kurso al aliaj lokoj de Esperantujo. Poste Małgosia Komarnicka proponis viziti Budapeŝton. La ideo realiĝis danke al perfekta kunlaboro kun Éva Baloghne Fodor, hungara esperantistino. La vojaĝantoj pasigis neforgeseblajn momentojn, ekzercante la lingvon Esperanto.

En 2019 Małgosia Komarnicka kune kun Felikso Wanderfogel el Francio preparis la 1-an **Esperantan Turneon**. Ĝi havis la titolon “Diversaj nacioj kaj kulturoj, sed nur unu komuna lingvo — Esperanto”. La ĉefa ideo de la turneo estis rekomendi Esperanton en diversaj landoj pere de speciale preparita programo. Ĝi estas prezentata fare de eksterlandanoj nur Esperante, kun traduko en la lokan lingvon. La partoprenintoj pruvis, ke sufiĉas nur unu lingvo por lerni la mondon. Esperanto helpas viziti diversajn landojn kaj ekkoni iliajn kulturojn, historion kaj homojn. La evento okazis ne nur por lokaj esperantistoj, sed por larĝa publiko. Granda pluso de tiu turneo estis tio, ke ĝiaj





partoprenintoj intense lernis Esperanton. Eŭropa Centro de Interkultura Edukado estas patrono de dancantaj pliaĝulinoj-kuraĝigistinoj. Ili nomiĝas Gracje. Ili dance ornamas multajn gravajn eventojn. Parto de tiuj pliaĝulinoj lernas la lingvon Esperanto. La fondinto de Gracje estas la vicprezidantino de Eŭropa Centro de Interkultura Edukado Lucyna Kowalewska.

La 8-a Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj okazos maje 2020 kaj daŭros du tagojn: – sabate, la 23-an de majo, okazos konkursa provaŭdo de la partoprenontoj; – dimanĉe, la 24-an de majo, estos Koncerto de Premiitoj. Dum ĝi estos anoncataj rezultoj kaj disdono de la premioj al la distingitaj partoprenantoj. Dum tiu koncerto kantos premiitoj kaj Esperanto-muzikisteloj.

La festivalo okazos en du kategorioj: 1) koruso aŭ ensemblo, 2) solisto. La premioj estos aljuĝataj en du kategorioj: koruso aŭ ensemblo kaj solisto. Ĉiuj partoprenontoj ricevos diplomojn. Por la unuaj tri lokoj kaj Ĉefpremio kaj Publik-premio, estos atribuitaj porokazaj pokaloj, diplomoj kaj objektaj donacoj. Danke al Lucyna Kowalewska, la kreativdirektorino de Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj, la festivalo abundas je multaj belaj premioj.

En la jaro 2019 la organizantoj fondis novan premion – **ARKONES-premio** (prezentiĝo dum la internacia arta aranĝo

en Poznano, Pollando). La prezentiĝojn de la partoprenontoj prijuĝos la jurio – aro de specialistoj: esperantistoj kaj muzikistoj. En la festivalo rajtas partopreni infanoj, junuloj, plenkreskuloj kaj pliaĝuloj. Ĉiu partoprenonto kantu du kantojn: unu en Esperanto, la alian en sia nacia aŭ fremda lingvo. Pritaksataj estos nur Esperantaj kantoj.

Eŭropa Centro de Interkultura Edukado, ILEI kaj *Juna Amiko* invitas esperantistojn partopreni la 8-an Eŭropan Festivalon de Esperantaj Kantoj! La evento estas vere interkultura kaj interesa. Tamen, bedaŭrinde, ĝis nun partoprenas en la festivalo ĉefe neesperantistoj, kiuj lernas Esperantajn kantojn. Mankas kantantaj esperantistoj. Do, vizitu la naskiĝlandon de L. Zamenhof kaj ekzercu la internacian lingvon Esperanto! Ĝuu kreadan kaj amikecan muzikan etoson! Partopreno de eksterlandaj esperantistoj plifortigus la bildon de la festivalo kaj fariĝus bela reklamo por Esperanto. La organizantoj de Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj petas helpon kaj apogon. Ĉiu helpspeco estas bezonata (skribu al la adreso: informado.eo@gmail.com)

Bonvenon!

Interkultura mondo esprimas koran dankon al la estraro de Eŭropa Centro de Interkultura Edukado pro la preparitaj materialoj.





Dum la franca revolucio

En 1789 Francio iĝis respubliko kaj ŝi daŭrigis siajn pripensadojn pri pli egala mondo, kaj kontestis la tiaman regulon pri balotado, laŭ kiu rajtas voĉdoni kaj elektiĝi nur riĉuloj kaj bienuloj. Ŝi ankaŭ engaĝiĝis kontraŭ la atakmilito de 1792 “ĉiu rajtas diskuti pri la sorto de sia patrolando”. Ŝi protestis antaŭ la parlamento kontraŭ la mortigo de la reĝo Ludoviko la XVI-a kaj verkis la teatraĵon “Francio savita de eltronigita tirano”.

Ŝi ankaŭ multe argumentis kaj skribis, por ke virinoj kaj viroj havu la samajn rajtojn. “Se virino rajtas surgrimpri eŝafodon (ekzekut-podion), ŝi same rajtu surgrimpri tribunon” (= se ŝi rajtas esti mort-punita, ŝi rajtu iĝi deputito kaj alparoli la parlamenton).

Ŝi estis la sola virino, invitita partopreni “Feston de la leĝo” kaj memortagon pri Bastilo (malliberejo), la 14-an de julio 1789.


En la teatraĵo “Monaĥejo aŭ altruditaj sankt-promesoj” en 1790, pri kiu debatis la parlamento, ŝi enkondukis eksedziĝon, malaperigon de religia geedziĝo, anstataŭigitan per socia kontrakto, egalrajtan statuson de eksteredziĝaj gefiloj, esploron pri patreco.

En diversaj artikoloj ŝi proponis kreadon de naskiĝdomoj, de naciaj atelieroj, de ŝirmejoj por senhejmuloj.

Entute ŝi verkis pli ol 50 artikolojn, kaj ankaŭ afiŝojn. Ŝi denuncis la

tiraniĝon de kelkaj famaj revoluciuloj, protestis en 1793 kontraŭ masakroj, nome de la revolucio “Sango, eĉ de kulpuloj, kruele kaj grandkvante verŝita eterne makulos la revolucion”.

Aldoniĝis al ŝiaj batal-temoj liberigo de homoj, enkarcerigitaj pro mon-ŝuldoj, malaltigo de la prezo de pano, imposto pagota de riĉuloj, forigo de premio al sklavistoj.



Ŝia morto kaj sekvoj


Evidente ŝiaj ideoj kaj kontraŭstaro al decidoj de la revoluciuloj malplaĉis. Se ŝi plurfoje evitis enkarcerigon pro subteno de famuloj, ŝi tamen estis arestita, ĉefe ĉar ŝi proponis sur afiŝo tri eblojn por nova registaro: respubliko / federacia respubliko / konstitucia monarkio.

Post la reĝino Marie-Antoinette ŝi estis la dua virino, senkapigita sur eŝafodo. Kiel jam skribite, Olympe de Gouges estis komplete forgesita dum du jarcentoj, dum depost 1987 estis propono entombigi ŝin en pariza Panteono

(monumento, kie kuŝas la plej elstaraj homoj), estis verkitaj romanoj, teatraĵo kaj

eĉ bildstrio pri ŝia vivo (Casterman 2012, ISBN 978-2-20303-177-7).

Do pripensu, kiom modernaj estis ŝiaj ideoj, kiuj ne ankoraŭ efektiviĝis en pluraj mondopartoj.





Jacqueline Poux

Fortikaĵo kun fromaĝoj

La “katedralo” de la fromaĝo “Comté” en Francio, fortikaĵo Saint-Antonie, situanta 1100 m super la maro, estis konstruita en 1880, por protekti la svisan limon.

Ĝi estis sesangula fortikaĵo, tute enterigita kaj plifortigita per volbo, kovrita per 5-metra-tavolo el ŝtonoj kaj tero; tio donis pli da sekureco, rezervejon de akvon ktp. La konstruado daŭris tri jarojn, sed la uzado – ankaŭ nur tri jarojn!

Marcel Petite estis pioniro pri biologia agrikulturo. De 1966 li reorganizis la fortikaĵon por fari el ĝi kelon, ĉar estis ideala loko por – maturigi fromaĝojn! Kun egala temperaturo (8°) kaj granda humideco (95%). Li malkovris, ke malrapida maturiĝo produktas esceptajn fromaĝojn. Kaj nun daŭre la kelo “Marcel Petite” funkcias tiel, kaj produktas



altnivelajn fromaĝojn “Comté”. Minimuma maturiĝo daŭras 10 monatojn.

Pro klimataj kialoj la regiono Franĉ-Konteo jam delonge specialiĝis pri produktado de lakto kaj fromaĝo. Por fabriki tiujn grandajn fromaĝojn la farmistoj grupiĝis en kooperativoj. Oni bezonas 450 litrojn da lakto por fabriki unu fromaĝon (“radon”, aŭ “muelŝtonon”).

En 1958 oni kreis unuigmarkon AOC (kontrolita origino), nur en ĵurasa montaro. Ĝi estas la plej grava AOC por francaj fromaĝoj. Ĉiu el la bovinoj “Montbéliarde” paŝtas sin sur unu hektaro da herbejo kun legumencoj, aromaj kaj medicinaj plantoj parfumas la lakton kaj konsekvence la fromaĝojn Comté, tiom multodorajn. Oni kolektas lakton en la ĉirkaŭaĵo ĝis 25 km.





Renkontiĝo) havas 3 familiojn da aromoj: kremo, frukto (anakardo) kaj spico (vanilio). Laboras tie 5 maturigistoj, kies profesio estas gustumi fromaĝon de la 8-a matene ĝis la 8-a vespere!

Unue ili elektas radon per la okuloj: aspekto de la krusto, koloro, formo. Poste ili rigardas la kodon, kiu donas la daton kaj nomon de la fromaĝejo. Konante la fruktejon oni scias, kiujn materialojn ili uzis, kiel ili laboris, la altecon de la vilaĝo, la kvaliton de la herbo, la sanecon de la brutoj ktp... Due ili karesas la fromaĝon, por senti, kia ĝi estas interne, ĉu enestas truoj aŭ ne. Trie, per sondilo (=marteleto) ili frapetas aŭ “sonorigas” la fromaĝon.

Per la fingroj la maturigisto analizas peceton, por koni la teksturon, kaj sur la lango li serĉas la 4 saporojn (sukera, sala, amara, acida) kaj en la buŝo la 6 aromojn.

Finfine li remetas la restantan peceton, kaj skribas kodon por klarigi, kia ĝi estas interne, la trovitajn aromojn, kaj al kiu publiko ĝi taŭgos. Tiuj kodoj estas sekretaj, transdonataj parole; nur la 5 gustumigistoj konas ĝin.

Jen la sekretoj de la malrapida fromaĝa maturiĝo en medio simila al natura groto.

La subtera katedralo Saint-Antonie jam produktis pli ol milionon da eminentaj fromaĝaj radoj.

(Pri la staĝo de “Esperanto en Chalonais” en Métabief, en “La abioj de amikeco”, vi povas legi en *Juna Amiko* 3/2018).

Oni devas uzi la lakton ĝis 24 horoj post la melkado. La lakto estas varmigita, poste oni aldonas kazeigilon kaj verŝas tiun kazeon en muldilon; ĝi fariĝas fromaĝo “en blanko”. Sur ĝin oni metas platon por identigi ĝin: daton, fruktejon... Poste tiuj radoj da fromaĝo venas en maturigan kelon kiel St Antoine.

La keloj: La fromaĝaj radoj ripozas sur bretoj el ligno picea, ĉar ĝi estas senodora.

25 personoj laboras tie: akcepto de junaj fromaĝoj, lavado de bretoj, regula turnado de radoj kaj aldono de salo (nun tiun laboron faras 7 aŭtomataj maŝinoj) ktp...

Unu aŭtomato zorgas pri 100 radoj hore, duoble pli multe ol homoj. Ĝi laboras 7 tagojn semajne, 24 horojn tage, kaj ne strikas... – tamen foje paneas!

La fromaĝo, kiun gustumis partoprenantoj de Esperanto-staĝo SFERO en Métabief (Svisa Familia Esperanto-



Fotoj: Stano Marček



Dulanda kongreso en Oceanio

La rubrikon
prizorgas:
Stefan MacGill



Ĝustaj faktoj pri Nov-Zelando kaj Aŭstralio, el la antaŭa numero:

1. Ĉefurbo ne la plej granda urbo. VERA: La plej grandaj urboj estas Aŭklando kaj Sidneo. La ĉefurboj, Welington kaj Kanbero estas ege malpli grandaj.

2. Multegas personoj, kiuj fanatike subtenas rugbean futbalon. VERA: La plej populara vintra sporto estas rugbeo. Ambaŭ landoj siatempe estis la mondaj ĉampionoj. La 'tradicia' futbalo ja ekzistas ambaŭlande kaj multe evoluis – precipe la virina teamo en Nov-Zelando. Tamen en Aŭstralio popularas alia versio de rugbeo, laŭ 'Ozi reguloj'.

3. Ambaŭ landoj havas enormajn kvantojn da karbono. MALVERA: Aŭstralio havas amason da karbono – grandparte eksportata al Azio. Ili uzas pezegajn mondrekorde longegajn trajnojn por tiri la karbon de la minejoj ĝis la havenoj. Nov-Zelando havas karbon, kiun same ĝi ĉefe eksportas, sed tute ne temas pri la samaj kvantoj.

4. Ambaŭ landoj havas multajn kanguruojn, kiuj vivas en la naturo. MALVERA: Kanguruoj vivas en la naturo (kaj abundas) nur en Aŭstralio.

5. Ambaŭ landoj havas danĝerajn serpentojn. MALVERA: Aŭstralio certe havas tiujn (ankaŭ mondrekordajn!), en Nov-Zelando tute ne ekzistas serpentoj en la naturo (simile al la insulo de Irlando, Islando, Gronlando kaj aliaj).

6. Ambaŭ landoj havas danĝerajn ŝarkojn. VERA: Precipe Aŭstralio havas tiujn: unue ĝi havas ege pli longan marbordon kaj la akvotemperaturoj estas pli altaj, sed ŝarkoj vagas suden ĝis Nov-Zelando; konato mia ond-bretanta estis atakita, eĉ tute sude, kie pli malvarmas la akvo.

7. Ambaŭ landoj havas valabiojn vivantaj en la naturo. VERA: Valabioj (etaj kanguruoj) estas indiĝenaj al Aŭstralio, sed estis frue alportitaj al Nov-Zelando, kie ili prosperas en kelkaj arbaroj kaj montoj.

8. Ambaŭ landoj havas Landan Asocion de UEA. VERA: Tiu de Aŭstralio estis fondita en 1911; tiu en Nov-Zelando en 1910.

9. Ambaŭ landoj havas cervojn kaj kuniklojn, kvankam ne indiĝenajn. VERA: Ili abundegas en ambaŭ landoj, kaj kaŭzas multan damaĝon

al arboj kaj arbustoj kaj herbejoj. Oni pafas ilin ambaŭlande por limigi la nombrojn.

10. La indiĝena popolo de ambaŭ landoj alvenis al la lando antaŭ ĉ. mil jaroj. MALVERA: La maorioj migris per kanotoj al Nov-Zelando antaŭ preskaŭ mil jaroj, eble el iuj sud-pacifikaj insuloj. La indiĝenoj de Aŭstralio kredeble enpaŝis la landon, kiu tiutempe ne estis insulego. Tio okazis antaŭ multaj jarmildekoj. Protestantoj por aborigenaj rajtoj pentris (antaŭ 40 jaroj) sloganon sur fervoja ponto en Renfern (antaŭurbo de Sidneo) kie troviĝas la Esperanto-oficejo) kiu tekstis: '40,000 jaroj estas longa tempo atendi'.

11. Ambaŭ landoj spertis or-febron en la 19a jarcento. VERA: La Aŭstralia febro okazis en pli vastaj terenoj; la serĉantoj devis elteni egan varmon. En Nov-Zelando la febro okazis nur en la okcidenta marbordo de la Suda Insulo, kie ministoj devis elteni regulajn kaj fortajn pluvŝtormojn.

12. Multaj personoj, kiuj ĝuas kaj ludas kriketon. VERA: Ambaŭ landoj, pro la kolonia pasinteco ĝuas, kaj eĉ komprenas la regulojn, de tiu kompleksa ludo. Ili nun kreas pli kompaktnajn formojn de la ludo: homoj ne plu povas permesi al si rigardi kvar-tagajn matĉojn.

13. Ambaŭ landoj enkondukis la virinan voĉdonrajton ene de tri jaroj. MALVERA: Nov-Zelando donis la voĉdonrajton en 1893, la dua lando de la mondo, post la Maksinsulo. Aŭstralio je federacia nivelo sekvis en 1902.

14. Oni paŝtas multegajn ŝafojn. VERA: La specio ne identas en ambaŭ landoj, en Aŭstralio la ŝafoj devas elteni grandajn sekecojn kaj varmon. Aŭstralio havas 74 milionojn da ŝafoj, Nov-Zelando ĉ. 30 milionojn. Kiam mi junis, estis 80 milionoj da ŝafoj kaj 3 milionoj da homoj, do dudek ŝafoj por ĉiu persono.

15. Ambaŭ landoj suferas tertremojn. MALVERA: Nur Nov-Zelando havas tiun riskon, ĝi troviĝas ene de la pacifika 'arko de fajro' kune kun Indonezio, Japanio, Kalifornio kaj la pacifika bordo de Latin-ameriko. La nov-zelandaj alpoj estas formitaj el 'junaj' faldo-rokoj, dum Aŭstralio havas ege maljunajn stabilajn rok-amasojn.



Landaj Reprezentantoj – Perantoj de *Juna Amiko*

Aŭstralio: Aŭstralio Esperanto-Asocio, G.P.O. Box 2122 Melbourne 3001; *info@esperanto.org.au*. **Aŭstrio:** Leopold Patek, Martinstr. 104/38, AT-3400 Klosterneuburg; *aon.913548977@aon.at*. **Belgio:** Flandra Esperanto-Ligo, Lange Beeldekenstraat 169, BE-2000 Antwerpen; *financoj@fel.esperanto.be*. **Brazilo:** Brazila Esperanto-Ligo, SDS Bl. P 36, Ed. Venâncio III, sala 303, BR 70393-902 Brasília-DF; *belabutiko@esperanto.org.br*. **Britio:** Esperanto Association of Britain, Esperanto House, Station Rd, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE; *eab@esperanto.org.uk*. **Bulgario:** Mariana P. Evlogieva, PK 973, BG-1000 Sofia; *mrvp@interpres.org*; *ilei@espereto.com*. **Ĉeĥio:** Pavel Polnický, Lidická 939/11, CZ-290 01 Poděbrady III.; *polnickypavel@seznam.cz*; *cea.polnicky@quick.cz*. **Ĉilio:** Héctor Campos Grez, Casilla 231 Curico; *strigo@esperanto.cl*. **Ĉinio:** Gong Xiaofeng, School of Environmental and Chemical Engineering, Nanchang University, Nanchang, CN-330031; *arko.gong@qq.com*. **Danio:** Arne Casper, Bryggervangen 70 4 tv, DK-2100 København; *arnecasper@yahoo.com*. **Estonio:** Ahto Siimson; *esperanto.ee*. **Finlando:** Paula Niinikorpi, Rusthollintie 6 as 10, FI-28430 Pori; *paula.niinikorpi@gmail.com*. **Francio:** Unuiĝo Franca por Esperanto, 4bis, rue de la Cerisaie, FR-75004 Paris; *esperanto-france@esperanto.org.net*. **Germanio:** Esperanto-Buchversand, Dr. Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Str. 9, DE-55129 Mainz; *wolfgang.schwanzer@esperanto.de*. **Germanio:** Zsófia Kóródy, Interkultura Centro Herzberg, Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg am Harz; *zsofia.korody@esperanto.de*. **Hispanio:** Pedro Garrote, Apartado 119 Esperanto, ES-47080 Valladolid; Kataluna Esperanto-Asocio, Apartado 1008, ES-08200 Sabadell, *sandra@esperanto.cat*. **Hungario:** Jozsef Nemeth, Fo u. 41/5, HU-8531 Ihász; *jozefo.nemeth@gmail.com* (por superaj membroj de ILEI); Stefan MacGill; *stefan.macgill@gmail.com* (por simplaj abonoj). **Islando:** Islanda Esperanto-Asocio, Pósthólf 1081, Skolavorðustigur 6B, IS-101 Reykjavík; *esperanto@isl.is*. **Israelo:** Gian Piero Savio, Rehov Menora 13/4, IL-5349007 Givatajim; *saviogp@netvision.net.il*; *esperantisto@live.com*. **Italio:** Luigia Oberrauch Madella, via Prampolini 8, IT-43122 Parma; *silkovojo@aliceposta.it*. **Japanio:** Japana Esperanto-Instituto, Japana filio de ILE, JP-162-0042 Tokyo-to, Sinzyuku-ku, Waseda-mati 12-3; *esperanto@jei.or.jp*. **Kroatio:** Marija Belošević, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb; *marija@hes-keu.hr*. **Kubo:** Kuba Esperanto-Asocio, Apartado Postal 5120, CU-10500 La Habana 2. **Litovio:** Litovia Esperanto-Asocio, ab/k 167, LT-3000 Kaunas; *irenaa@takas.lt*. **No-Zelando:** David Ryan, PO Box 3867, Wellington 6140, *ryangomez@xtra.co.nz*. **Pakistano:** Jawaid Eahsan, P.O. Box 26, PK-60000 Multan. **Pollando:** Magdalena Tatara, Grzegorzeczka 74/4, PL-31-559 Kraków; *mtatara@gmail.com*. **Portugalio:** Portugala Esperanto-Asocio, Rua Dr. Joao Couto 6. R/C A, PT-1500 Lisboa; *asocio@esperanto.pt*. **Rumanio:** Ioan Crâncău, B-dul București 5/53, RO-430281 Baia Mare. **Rusio:** Halina Gorecka, ab. ja. 1205, RU-236039 Kaliningrad; *sezonoj@mail.ru*. **Slovakio:** Peter Baláž, Víťazná 840/67A, SK-958 04 Partizánske; *petro@ikso.net*. **Slovenio:** Višnja Branković, Via Parini 5 IT-34 129 Trieste. **Sud-Afriko:** Colin Beckford, C2 Plaza Hill 3, Bower Road, ZA-7800 Wynberg. **Svedio:** Sten Svenonius, *sten@agado.net*. **Svislando:** Christoph Scheidegger, Im Schleedom 6, CH-4224 Nenzlingen; *ch_scheidegger@bluewin.ch*. **Tajvano:** Reza Kheirkhah, No. 105, Chung Ching Road, Pingtung, 900-73; *rezamenhof@yahoo.com*. **Togo:** Koffi Gbeglo, B. P. 13169, Lome; *esp.togo@cafe.tg*. **Usono:** Esperanto-USA, 91-J Auburn St #1248, Portland ME 04103; *eusa@esperanto-usa.org*. **Por vidhandikapuloj:** Vjačeslav Suslov; *gloro59@yandex.ru*. **Mendojn eblas sendi ankaŭ al** *ilei.officejo@gmail.com*.



Ĉu ni havas novan lernanton?

Ne, sinjorino Trikapa, tio estas mia floro. Sola ĝi enuas



Strange!

Ĝi ne estas hejmbesto, ĝi estas hejmkreskaĵo!

Interese!

Hejmbestoj en la lernejo estas malpermesitaj



Bone, ĝi restu

Kaj la temo de la leciono estas...

...monstroplantoj!

...kaj aliaj longaj vortoj!